

THE BRITISH ESPERANTIST

The Official Organ of the British Esperanto Association.

VOL^o IV^o N-RO 44.

AUGUSTO, 1908.

PREZO 3 PENCOJ.

KOSTO DE ABONO, AFRANKITE.

EN GRANDA BRITUJO.

Por unu jaro	3 ŝilingoj.
Unu numero	3 pencoj.

EKSTERLANDE.

Por unu jaro	\$0.75, fr.4, M.3.
Laŭ Internacia Mono	Sm. 1.50.

Abonoj estas akceptataj de la komenciĝo de ĉiu monato, kaj poŝmarkoj estas akcepteblaj laŭ efektiva valoro. Sin turni al la Sekretario, 133-136, *High Holborn, London, W.C.*

REDAKCIO.

Manuskriptoj, k.t.p., devas esti sendataj al la Redakta Komitato, 133-136, *High Holborn, London, W.C.*

Pri artikoloj la Komitato rezervas al si la rajton korekti la erarojn de stilo, k.t.p.

Ordinare oni ne povas resendi artikolojn neakceptitajn.

ANONCOJ.

Pri Anoncoj, sin turni al S-ro C. A. G. Browne, 53, *Wych-street, London, W.C.*

Antau la

KARAJ KUNBATALANTOJ, — La samideano baldaŭ kunvenos en Dresdeno por partopreni en la Kvarta Kongreso. Bone estos, ke tien ironte el tiel multaj kaj malproksimaj landoj, ni iom pripensu, por kia celo ni tien vojaĝas. Nu, tiun celon de nia kunveno nenio povas pli klare montri, ol la jenaj trafaj vortoj de la Majstro en Cambridge :—

“Por kio do ni kunvenas? Ĉu ni kunvenas por paroli pri esperantaj lingvaj demandoj? Ne! tiuj ĉi demandoj apartenas ne al la kongreso, sed ekskluzive al la Lingva Komitato, kaj por ili sufiĉus kongreso de komitatanoj. Ĉu ni kunvenas por ekzerciĝi en esperanta parolado? Por tio sola, ni ne bezonas veturi al kongreso, ĉar en niaj hejmaj grupoj ni povas en la daŭro de la tuta jaro multe pli ekzerciĝi, ol en la kelkaj tagoj de la kongreso, kaj por la sola kelktaga ekzerciĝo en parolado neniu entreprenus grandajn vojaĝojn. Ĉu ni kunvenas por fari manifestacion kaj sekve propagandon? Jes, certe! Sed ĉar el cent kongresanoj almenaŭ naŭdek-naŭ havas de Esperanto nur *moralan* profiton, por kio do ni ĝin propagandas? Mi ne dubas, ke la plimulto el vi donos al ni nur unu respondon: ni faras manifestacion kaj propagandon por la Esper-

ENHAZO.	PAGO
Antaŭ la Kongreso	141
Flavigintaj Pagoj. H. W. SOUTHCOME	142
La Pasinteco—Malriĉula Ludilo	144
Marista Terminaro. ROLLET DE L'ISLE	145
Aŭtokromio. CH. VERAX	146
Alilanda Opiniaro	147
Miaj “Esperantaj Semajnoj.” A. CHRISTEN	149
Libraro kaj Gazetaro	150
Chronicle	152
B.E.A. Council Meeting	154
The Progress of Esperanto. W. MANN	155
Internacia Alvoko—Propaganda Fund	156
Ekskursoj al Dresdeno	157
Kongresaj Sciigoj	158
B.E.A. Candidates for Membership, Exams., &c.	159
Respondoj al Korespondantoj.—F.K.I.	160

Kongreso.

antismo ne pro ia utilo, kiun ĉiu el ni persone povas havi de ĝi, sed pro tiu gravega signifo, kiun la Esperantismo havas por la tuta *homaro*, pro tiu komunehoma celo, kiu nin, aktivajn Esperantistojn, altiris al Esperanto; ni kunvenas ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo, por havi la ĝojon vidi samideanojn, por premi al ili la manon, por varmigi en ni per reciproka renkontiĝo kaj kunvivo la amon kaj entuziasmon por la ideo, kiun la Esperantismo en si enhavas. Kiel la antikvaj hebreoj tri fojojn ĉiujare kunvenadis en Jeruzalemo, por vigligadi en si la amon al la ideo monoteisma, tiel ni ĉiujare kunvenas en la ĉefurbo de Esperantujo, por vigligi en ni la amon al la ideo esperantisma. *Kaj tio ĉi estas la ĉefa esenco kaj la ĉefa celo de niaj kongresoj.*”

Jes, la ĉefa celo estas ja tio. Tiun ĉi fojon, tamen, estas nia deziro, fari ion pli, kaj ni ne dubas, ke ni voĉos la komunan senton de ĉiuj britaj Esperantistoj, kiam ni esprimos al nia amata Majstro nian plej vivan simpatian pri la bedaŭrindaj epizodoj de la lastaj monatoj kaj certigos denove nian daŭrontan konfidon al li, kaj nian firman fidelecon al lia lingvo.

THE BRITISH ESPERANTIST.

Flavigintaj Paĝoj.

Pasis okaze tra miaj manoj la unuaj kvin maldikaj jarkolektoj de *La Esperantisto* (Septembro, 1889—Decembro, 1894), kiu estis mia unua esperantista gazeto.

Kelkaj paĝoj montras makulojn de krajona skribajo, de fingroj aŭ de faldoj, ĉar la unua posedanto ne povis antaŭvidi, ke en tempo estonta ĉiu kajero havos altan monan valoron.

Kun sentoj de granda intereso, eĉ de vera respektego, mi foliumis la malfortajn paĝojn, kiujn la forfluginta tempo jam komencis flavigi.

Tie troviĝis, kvazaŭ sur karto, la bildo de la unuaj esperoj kaj bataloj, la cento da malfacilaĵoj, la ĝojigaj venketoj, la preskaŭ netrapaseblaj bariloj, la indiferenteco de la mondo kaj la malhelpoj senĉese kreitaj de la Esperantistaro mem.

Kaj sub ĉio ankaŭ montrigas, kiel ŝonega bazo, la mirinda genio de la Majstro; montrigas lia fortan mano, lia senfina, neniam mankanta gentileco, lia obstina, ŝajne sensukcesa jaron-post-jara batalado, sen helpo, sen mono, sen ĉio — sed neniam sen espero — kaj la senfina pacienco, per kiu li suferis ĉiujn atakojn, ĉiam kredante al la fina venko.

Kiam en Boulogne, alvenintaj el ĉiuj anguloj de la terglobo, ni ĉiuj ĉiuj hore kaj laŭtvoĉe aklamis lin, kiel malmultaj inter ni plene komprenis per kia longa, dorna kaj malfacila vojo li atingis tian rezultaton; dum kiom da malfacilaj jaroj li jam oferis al nia afero sian propran feliĉon kaj preskaŭ sian tutan vivon.

Pri tiuj ĉi unuaj jaroj la paĝoj de tiu ĉi malnova gazeto malkovras la tutan historion.

Ĉiu scias, ke Esperanto "malkovris sian vizagon al la mondo" en lernolibro, kiun D-ro Esperanto publikigis en la jaro 1887. La PROBE NUMMER de la gazeto *La Esperantisto* estis eldonita en Nürnberg la 1-an de Septembro, 1889.

Estis gazeto "por la amikoj de la lingvo Esperanto," kaj la unua paĝo estis presita esperante, germane kaj france. Ĝi estis "sub la kunlaborado de D-ro Esperanto (D-ro L. Zamenhof), eldonata de Chr. Schmidt, prezidanto de la klubo mondlingva en Nürnberg." Fine, D-ro Zamenhof mem fariĝis redaktoro kaj posedanto de la gazeto.

La unua paĝo tiele komencigas: "La lingvo internacia 'Esperanto' en mallonga tempo trovis multegon da amikoj en diversaj landoj. La nombro de tiuj ĉi amikoj kun ĉiu tago, kun ĉiu horo kreskas, kaj nun jam forte estas sentata la bezono de ia organo, kiu interligus ĉiujn la disjitetajn amikojn kaj donus al ili la eblon paroli kaj konsili ĉiun kun la alia. Obeante la peton de multegaj amikoj de la lingvo Esperanto, ni decidis fondi gazeton, kiu havos

la celon labori por la progresado de tiu ĉi lingvo kaj por la vastigado ĝin (sic) en la mondo."

La movado ŝajne prosperis malgrau multe da malfacilaĵoj.

La rusaj legoj estis unu malhelpo, ĉar la granda plimulto de la tiutempaj ajoj estis rusoj, kaj neniu ruso volis enskribigi sin kiel membron de ia "klubo."

La sama malfacilaĵo pri la rusa cenzuristo igis la gazeton aperi en Nürnberg kaj fine, post kelkaj jaroj, la cenzuristo malpermesis ĝin kaj ĝi ĉesis pro tiu ĉi kaŭzo.

Alia malhelpo estis la disvastigado de Volapük, pri kiu oni ofte renkontas artikolojn. Alia tre grava estis manko de mono, kiu preskaŭ ĉesis la gazeton en la fino de la dua jaro, sed tiu ĉi malaperis per la agado de S-ro W. Trompeter, kiu prenis sur sin la financon respondecon.

Cia propono de la Majstro pri disvastigado aŭ pri organizado trovis ĉiam multajn kontraŭulojn, sed pli malbonaj ol ĉiuj aliaj malhelpoj estis la "plibonigistoj."

Ili amase kolektigis ĉirkaŭ la nova elpensajo kiel mušoj ĉirkaŭ mielo. Unu skribis, ke li eklernos Esperanton, se la Doktoro kompleze elstrekos la vorton "kaj," ĉar li ne amis tiun ĉi vorton. Aliaj proponis aliajn diversajn kaj pli malpli sagajn proponojn.

Sed la Majstro ĉion travivis, kaj ĉiam trovis almenaŭ areton da kunlaborantoj kaj helpantoj.

La unua libraro konsistis el 16 verkoj, inter kiuj No. 5 estis la lernolibro de nia samlandano R. Geoghegan. Kvankam li post ne longe translogigis Amerikon, lia adreso almenaŭ ĝis Oktobro, 1890, estis en Birkenhead, Anglujo. Li ankoraŭ iafoge, kiel niaj legantoj memoros, verkadas artikolojn por THE BRITISH ESPERANTIST.

Oni ankaŭ renkontis la nomon de L. E. Meier, la konata nuntempa verkisto, kaj la nomon de Grabowski, kies "Kondukanto" estis inter la unuaj esperantistaj libroj kaj estas ĝis hodiaŭ unu el la plej bonaj.

Inter alia presaĵo oni rekonas la bone konatajn verkojn "La Virineto de Maro," "La Nigra Virino," "La Forgesita Pipo," kaj la plimulton de la enhavo de la *Krestomatio* (1903). La krestomatiaj "Bagateloj" estas represo de la tiel nomita ĉiumonata fako de la gazeto.

En la fino de 1890 la libraro kalkulis 41 librojn aŭ libretojn, plejparte naciajn lernolibrojn.

En Januaro, 1892, *La Esperantisto* estis la sola gazeto krom unu nekonstanta gazeto en Sofio (Bulgarujo). Niaj bulgaraj samideanoj ŝajne komencis montri sin naskemaj por nekonstantaj gazetoj eĉ en tiu ĉi frua tempo.

La Adresaro en la fino de 1892 kreskis, ĝis ĝi enhavis 2,054 nomojn.

En la fino de la tria jaro la nomoj de la

abonintoj montras, ke Esperanto apenaŭ komencis ankoraŭ disvastiĝi eksterlande. Jen la nombro de ĉiu lando:—Rusujo, 335; Germanujo, 124; Svedujo, 56; Francujo, 10; Belgujo, 1; Italujo, 4; Bulgarujo, 3; Hispanujo, 2; Anglujo, 1; Portugalujo, 1; Brazilujo, 1; Norda Ameriko, 6; Sume, 544.

Unu plej frua deziro de D-ro Zamenhof, pri kiu oni multe legas en tiuj ĉi gazetoj, estis la starigado de tutmonda "Ligo." Post multaj kontratparoloj la Ligo efektivigis en la jaro 1893 kaj funkciadis dum kelke da tempo. Ĉu ĝi vivis longe aŭ mallonge mi ne scias, sed supozeble la sama agado de la rusa cenzuristo, kiu ĉesigis la gazeton mem, samtempe ĉesigis la Ligon, kiu estis interligita kun la gazeto. La "Kanto de la Ligo" konservita en la *Krestomatio* estas la sola restaĵo de la tiutempa Ligo, sed la Ligo meritas honoran lokon en nia historio, ĉar estis al la Ligo, ke D-ro Zamenhof submetis la proponojn pri ŝangoj, kaj estis la Ligo, kiu per granda plimulto decidis daŭrigi la lingvon tute sen ia ŝango. Pro tio ĉi ni devas ilin danki, ke nia lingvo estas tute tiel sama hodiaŭ, kiel la lingvo de la gazeto skribita en 1889.

Preterpasante ni rimarku, ke D-ro Zamenhof ree revenis al la sama ideo kaj proponis tutmondan Ligon al la Bulonja Kongreso, kaj ree, kiel antaŭe, aro da kontraŭuloj kriegis kontraŭ lia bone maturigitaj opinioj. Kun bedaŭro mi memoras, ke mi estis unu el tiuj novenaskitaj kriemaj malsaguloj.

De la plej fruaj tempoj la Majstro suferis de diversaj kontraŭuloj, sed la plej malbonaj, antaŭe kiel nuntempe, estis la "plibonigistoj." Ili aperis en la unua jaro kaj senĉese postulis ŝangojn.

Fine D-ro Zamenhof cedis ĝis certa grado. Li promesis serion da artikoloj, en kiu li "analizos la tutan lingvon" kaj, tion farinte, li submetis la tutan aferon al la voĉdonado de la Ligo.

Kun lia kutima pleneco li laboradis pri tio monaton post monato. Inter la finaj proponoj estis la forigo de la ofta uzado de *aj*, *oj*, *ajn* kaj *ojn*, kaj la forigo de la supersignitaj literoj.

Kiam la liganoj fine voĉdonis, 107 estis por diversaj ŝangoj, kaj 157 voĉdonis kontraŭ ĉia ŝango *ajn*.

Inter la personoj, kiuj tutkore kontraŭstaris ian ŝangon, estis S-ro L. de Beaufront.

Li frue aligis al la Esperantismo kaj (Januaro, 1891) skribis en longa letero al D-ro Zamenhof: "Mi ekzamenis la lingvon ĉiujanke, kaj ju pli mi konsideras ĝian konstruon de reguloj kaj vortoj, des pli mi admiras la profundan logikon, kiu vin inspiris kaj kondukis ĉiam rekte en vojo tiel malfermita por multegaj eraroj. Kiom da bariloj Vi devis detrui, kiom da malfacilaĵoj

Vi devis venki — tion plene komprenas nur tiuj, kiuj laboradis, kiel mi en la daŭro de ses jaroj super sistemo simila."

Kaj ree en la numero de Aprilo, 1893: "Mi esperas, ke niaj amikoj estos modestaj en iliaj proponoj de ŝangoj. Estus tute bedaŭrinde, se la novaj adeptoj vidus ĉiumonate: ŝangu tion ĉi, plibonigu tion, korektu tie. Ni perdus rapide la konfidon al lingvo, kies partianoj, kiel ŝajnus, akceptas ĝin nur por povi ĝin ŝangi. Objekton bonan oni ne devas tro tuſi; alie anstataŭ perfektigo oni alportas al ĝi nur kripligon."

"Se longaj jaroj de pripensado kaj sep jaroj de laborado super unu demando donas al ia homo kelkan kompetentecon tuſante ĝin, mi trovas min en tia situacio, kaj tial mi permesas al mi rememorigi niajn amikojn, ke, aparte pri lingvo tutmonda, nur tiu bone konas la faritaĵon, kiu ĝin faris."

D-ro Zamenhof aldonis al tiu ĉi letero la jenajn opiniojn, kiujn li esprimis kaj ripete esprimis en numero post numero de la gazeto: "La pensojn, esprimitajn en la supre presitaj leteroj* mi plene aprobas. La legantoj scias, ke jam multajn fojojn mi esprimis ankaŭ tiujn ĉi samajn pensojn, mi montris la tutan dangeron, kiun en la nuna tempo alportus ĉia eĉ plej malgranda ŝango en nia lingvo."

Denove en Julio, 1892, D-ro Zamenhof klare kaj neſancelige skribis: "Sed, kvankam mi cedis al la insista premo de kelkaj amikoj, kiuj petadis min proponi kelkajn 'plibonigojn' kaj diradis, ke pro mia 'obstineco' kaj pro mia 'patra blindeco' nia afero ne povas bone vastigi, mi tamen ripetas, ke mia persona opinio, kiel la legantoj scias, estas, ke ju malpli ni tuſos nian lingvon (almenaŭ ĝis ĝia plena fortigo) des pli bone." El pura forgesemeco, sendube, S-ro de Beaufront nun skribas en *L'Espérantiste*, ke D-ro Zamenhof "per tiu faro" (nome propono de ŝangoj) "sin montris la ĉefo de l' reformistoj."

Post la fina voĉdonado D-ro Zamenhof skribis la samajn opiniojn, kiujn li ĉiam skribis kaj kiujn li ĝis hodiaŭ ankoraŭ skribadas:

"La fina rezultato sekve estas: La plimulto da esperantistoj decidis, ke **la lingvo Esperanto devas tute sen la ŝango resti en sia ĝisnuna formo.** Tion ĉi mi sciigas al niaj amikoj. De ĉiuj komentarioj ni nin detenas, ĉar la maldolĉeco de la disputoj estas ankoraŭ freſa, kaj estas bone ne tuſi ĝin. Nur unu klarigon ni deziras doni por tiuj personoj, kiuj erare komprenas la esencon kaj rezultaton de la voĉdonado: Kelkaj pensas, ke la farita decido malpermesas por ĉiam ian ŝangon en nia lingvo kaj faras ĝin por ĉiam tute rigida. Tio ĉi estas

* Leteroj de S-ro de B. kaj aliaj, kiuj aperis en la sama numero.

eraro, ĉar ĉiu ja devas bone kompreni, ke ni, malgranda kolekto da homoj, ne povas fari ian decidon por ĉiam en afero, en kiu — laŭ nia espero — poste partoprenos grandaj multegoj da aliaj homoj. La plimulto trovis, ke pro diversaj kaŭzoj en la nuna tempo nenio en la lingvo devas esti sangita; ĉu iam poste oni faros iajn sangojn aŭ ne — pri tio neniu decidis nek povas decidi.

La kvina jarkolekto feliĉe finigas per tiu ĉi decido. La nova malforta ŝipeto travivis unu ventegon, kiel estonte ĝi facile travivos multajn aliajn.

Kiam mi fermas tiujn ĉi malnovajn paĝojn, kiom da pensoj la makulitaj paĝoj naskas!

Forfluganta tempo ankaŭ post nelonge flavigos la paĝojn, kiujn ni hodiaŭ estas skribintaj. Kion dum la estonta dudeko da jaroj atendas nian aferon? Ĉu ni hodiaŭ montras sin indaj posteuloj de la unuaj batalantoj, kiuj malgraŭ ĉia malheipo atingis tutmondan sukceson? Ĉu ni montras unu duonon de ilia forteco kaj persisteco? Ĉu iam ni povos ĝojigi la koron de la Majstro montrante al li, el unu lando post alia, la atingon de fina kaj plena venko? Ĉu nia plej longa esperebla vivtempo estas sufiĉe longa, ĉar nek li nek ni povas vivi por ĉiam? Ĉu ni estas pretaj, sufiĉe oferi kaj labori? Al tiuj ĉi demandoj taŭgas nur unu respondo: la rezultato dependas sole de ni mem.

Ne mankas al ni la povo, ne manku al ni la volo.

H. W. SOUTHCOME.

La Pasinteco.

De MAURICE MAETERLINCK.

“Kio pasis, ja pasis,” oni diras, kaj tio ĉi estas malvera; ĉiam la pasinteco estas. “La Ŝargon de sia pasinteco oni devas surporti,” oni ekgemas, kaj tio ĉi estas malvera; la Ŝargon la pasinteco surportas. “Nenio ajn povas elvi si la pasintecon,” kaj tio ĉi estas malvera; eĉ la plej malgranda peno de la volo traveturigas tra la pasinteco, la estantecon kaj la estontecon, por elvi si, kion ajn oni ordonas, ke ili elvisu. “La nedetrubla, neriparebla, neſangebla pasinteco!” Kaj ankaŭ tio ĉi estas neniel pli vera, ol la aliaj. Ĉe tiuj, kiuj tiel parolas, ĝi ja estas la estanteco, kiu estas neſangebla kaj ne scias kiel sin ripari. “Malbonega estas mia pasinteco, dolora, malplena,” ankaŭ oni diras; “postrigardante mi povas vidi nenian momenton de la beleco, de la feliceco, aŭ de la amo”, krom mizeraj ruinoj mi vidas tienion. . . . Kaj tio ĉi estas malvera; ĉar ĝuste kion oni metas mem tie en la momento, kiam la okuloj direktigas al ĝi, tion oni vidas.

R. FANSHAW.

Malriĉula Ludilo . . .

El “Petits Poèmes en Prose,” de BAUDELAIRE.
Tradukis ARTHUR GRAY.

Mi volas doni ideon de senkulpa amuzrimedo. Estas tiel malmultaj amuzoj, kiuj ne estas kulpindaj.

Kiam vi eliros la domon, matene, kun la intenco decidita vagadi sur la grandaj vojoj, plenigu viajn poſojn per tiaj elpensitaj unupencaj, — kiaj la plata pulcanelo movata per sola fadeno, la forĝistoj kiuj batas amboson, la ĉevalisto kaj lia ĉevalo kies vosto estas fajfilo, — kaj laŭlonge de la trinkejoj, ĉe la piedo de la arboj, oferu ilin donace al la nekonataj kaj malriĉaj infanoj, kiujn vi renkontos. Vi vidos, ke iliaj okuloj pligrandigas senmezure. Komence, ili ne kuragos preni; ili dubados pri sia felico. Sekve iliaj manoj prenegos la donacon, kaj ili forflugos, tute kiel la kato, kiu iras mangi malproksime de vi la peceton, kium vi donis al ĝi, lerninte malkonfidi al la homo.

Sur vojo, post ĉirkaŭrado de vasta ĝardeno, en kies fundo brilis la blankeco de bela kastelo frapata de la suno, troviĝis bela kaj freŝa infano, portanta tiujn vestojn de kamparo tiel plenajn de koketeco.

La lukso, la senzorgeco kaj la kutima vidado de la riĉeco faras tiujn infanojn tiel belaj, ke oni kredus ilin faritaj el malsama pasto, ol la infanoj de mezstato aŭ de malriĉeco.

Je lia flanko kuſis sur la herbo belega ludilo, freŝa kiel ĝia mastro, laktita, orumita, purpure vestita kaj kovrita per plumoj kaj juveletoj el vitro. Sed la infano ne rigardis sian preferitan ludilon, — kaj jen kion li rigardis:

Je la alia flanko de la krado, sur la vojo, inter la kardoj kaj la urtikoj, estis alia infano, mal-pura, malfortika, unu el tiuj “marmotoj” kies belecon eltrovus okulo *semantaujuga*, se, kiel la okulo de lertulo divenas idealan pentrajon sub la lako de kalefario, oni forlavis de la infano la suprajacon de la mizerio.

Tra tiu simbola barilo fortananta du mondojn, la grandan vojon kaj la kastelon, la malriĉa infano montris al la riĉa sian propran ludilon, kiu tiu lasta ekzamenis avide kiel objekton maloftan kaj nekonatan. Nu, tiu ludilo, kiu la eta malpurulo incitaĉis, malkvietigis kaj skuadis en krada skatolo, estis vivanta rato! La gepatroj, pro ŝparemo sendube, ĉerpis la ludilon el la vivo mem.

Kaj la du infanoj alridis fratemete unu la alian, kun dentoj *egale* blankaj.

A New Text-book specially prepared for Evening Continuation Classes by an experienced teacher—Miss M. L. Jones, of Liverpool—will appear in SEPTEMBER. The book will be in the form of 24 chapters, each chapter containing sufficient diversified matter for each week's lesson. We foresee a very useful book.

Marista Terminaro.

Sinjoro Rollet de l'Isle, la kompilinto de la jus eldonita "Provo de Marista Terminaro," sendis al ni interesan leteron kaj kritikon pri la traduko "Malsupreniro en la Turnakvon," kiu aperis antaŭ nelonga tempo en THE BRITISH ESPERANTIST.

La kritikon ni presigas detale, sed la leteron, pro malvasteco de disponebla loko, ni devas resumi. Gi celas precipe la enkondukadon de novaj vortoj per la jurnaloj. Nia samideano komencas, citante la vortojn de D-ro Zamenhof en la Fundamento:

"Ricigadi la lingvon per novaj vortoj, oni povas jam nun (1^o) per konsiligo kun tiuj personoj, kiu estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo, (2^o) zorgante pri tio, ke ĉiuj uzu tiujn vortojn en la sama formo."

La unua kondiĉo, li diras, ne estas ĉiam facile efektivigebla; la dua kondiĉo povas kaj ĉiam devus esti plenumata.

En jurnaloj, por plenumi tiun duan kondiĉon, oni devus trudi — pro generala intereso — uzon de metodo, kiun ĝis nun oni tro maloste uzas: Kiam aŭtoro uzos en presita teksto novan vorton nenie antaŭe de li veditan, li presigos tiun vorton *italic*, kaj montros, en mallonga noto je la suba parto de la paĝo, la tradukojn de tiu vorto en almenaŭ tri el la kvin naciaj lingvoj de la Fundamento, kaj, se eble, malgrandan klarigon pri la ĝusta signifo de tiu vorto. Se la aŭtoro ne konas tiujn tradukojn, tiuokaze li ne povas prave elpensi novan vorton; ĉar kiu povas determini la vere internacian formon de vorto, se li ne scias almenaŭ kelke da naciaj formoj?

Tiu metodon oni devus ankaŭ uzi por la vortaroj, ĉar enkonduki novan vorton, sciigante nur ĝian tradukon en unu nacia lingvo, estas multe pli dangera en vortaro, kie vorto staras tute sola kaj sendependa,

Terminaro.

ol en jurnalaj kiel estas kunteksto iom klariganta ĝian signifon.

Plue, bone estus, ke ĵa kritiko de la jurnalaj artikoloj estu farita de Esperantisto nesamnacia de la aŭtoro. Tiu kritiko estus farita ne pri la observado de la reguloj de la lingvo — kio povas esti efektivigata nur de tre lerta Esperantisto — sed nur pri la facila internacia komprenebleco. Okazas ofte, ke iu Esperantisto enkondukas senatente idiotismojn aŭ formojn devenantajn de la spirito de sia propra lingvo; montri tujn difektaojn utilus multe al la konservado de la internacieco de Esperanto. Ĉiu jurnalaj povus en unu paĝo publikigi la kritikojn, kiu ĝi ricevas, kaj la ebla diskutado kun la aŭtoroj estus tre interesa. (Se nur estus spaco! — RED.)

Por doni al vi ekzemplon — diris mia korespondanto — mi sendas al vi tian kritikon de artikolo publikigita en la lastaj numeroj de via jurnalaj, kaj kiu estas des pli interesa por mi, ke ĝi enhavas kelkajn maristajn esprimojn. Mi certe ne ofendos la aŭtoron, dirante, ke ĝenerale li malbone tradukis tiujn esprimojn pro lia nelerteco pri la maristaj aferoj. Aliparte mi nur komprenis tiujn esprimojn, dank' al la franca traduko de la angla teksto, kiu estas farita de la fama verkisto Charles Baudelaire, kaj en kiu trovigas gustaj maristaj esprimoj.

Ni esprimas nian koran dankon al S-ro Rollet de l' Isle pro liaj kritikoj, kun la plejmulto de kiuj ni konsentas; sed ni devas rimarkigi, ke la artikolo kritikita tute ne estas — ĝi en la angla lingvo — maristan legantaron, sed nur la generalan publikon; kaj ni kredas, ke la *technika* traduko ne estas malpli interesa, de literatura vidpunkto; ol *technika* traduko. Niajn respondojn ni postmetis inter kvadrataj kranipoj. — (RED.)

En la Número de Februaro:

pg. 27, kol. 1, lin. 46: grado de *largo*. — Mi proponas *latitudo*. A. latitude, F. latitude, G. Breite, Sp. latitud, It. latitudine.

kol. 1, lasta linio: *nubia*. — Kion signifas tiu vorto? [Nubio = lando en Afriko.]

kol. 2, lin. 23: *nagis je ankro kün veloj falditaj*. — Nekomprenebla. En la traduko de Ch. Baudelaire en franca lingvo, mi legis tiun frazon (mi tradukas ĝin esperante) ... *Ke brigo, tute en la spaca maro, kapeis, kün du refoj en siaj veloj, ... Kapei*: A. to try, F. capéyer, G. beiliegen, Sp. Capear. [Sed kapei estas netrans., dum la angla *to try, to lay to* estas transitiva.] *Refo*: A. reef, F. ris, G. Reef, Sp. Rizo. [Jam en la Vortaro de Motteau.]

pg. 28, kol. 1, lin. 12: *ricevis al si*. — Laŭ la franca traduko oni devus diri: *alprenis*...

kol. 1, antaŭlasta linio: *Ce la kresko de la tajdo*.

Tio signifas la *fluso*: A. flood (tide), F. flux, G. Flut, Sp. flujo.

kol. 2, lin. 1: *refluado*. — Malo de la *fluso*: do *malfluso*.

kol. 2, lin. 12: *al kaj forfluoj de la tajdo*. — Vidu ĉi supre.

kol. 2, lin. 18: *jahtoj*. — Mi proponas *jakto*. [Jahto jam akceptita en Esp.-Germ. vortaro.]

kol. 2, lin. 32: *kirladas*. — Kion signifas tiu vorto? [Kirli = to whirl, F. tourbillon, G. quirlen. K = ang. wh, vidu kies, whose; kiu, who, k.t.p.]

kol. 2, lin. 46: *elprivo*. — Kial la afikso *el*? [Por montri la plenfarecon = la finitecon de la ago.]

Número de Marso:

pg. 41, kol. 1, lin. 36: *malantaŭ*. — Sajnas al ni ke

oni devus diri: *gis la malantaŭa parto de tiu ĉi roko*.

kol. 1, lin. 41: *skuneto*. — Mi proponas: *brig*.

A. brig, F. brick, G. Brigg, It. brig, Sp. bergantin.

[Kial? Le vorto *skuno* ja ekzistas, vidu G.-E. vortaro.]

pg. 44, kol. 2, lin. 16: *flankvento*. — En la franca traduko mi legas: *large*; tiu vento ne venas de la flanko de la ŝipo, sed konfratite de malantaŭe, kaj mi proponas: *large*. A. large, F. large, G. Raum, Sp. largo, It. largo. [Sajnas, ke la franca tradukinto eraris ĉi tie, ĉar la angla esprimo estas *steady side wind* = datura flankvento.]

kol. 2, lin. 20: *je ankro*. — Mi dirus: *ankritaj*.

kol. 2, lin. 28: *implikigis*. — Nekomprenebla; eble oni devus diri: *tordigis* aŭ *difektigis*. [Ce Zamenhof (Pred. IX.) ni trovas: "kiel birdoj implikigintaj en kaptilon." Cu la ankro ne implikigis kun sia ĉeno?]

kol. 2, lin. 36, *prosperis al ni*. — Mi opinias, ke estus pli bone diri: *ni sukcesis transpasi* [Ne; la angla esprimo estas, *we made shift to*.]

kol. 2, lin. 49: *Kiam ĉio estas dirita*. — France mi legas "tout bien considéré," kion oni tradukus: *ĉio estante ekzamenita*. [Ne; la angla esprimo estas: *after all is said and done*.]

pg. 45, kol. 1, lin. 9: *ekforfluo*. — Laŭ la franca teksto oni devus diri: *je la momento de la kvietaj fluoj*.

kol. 1, lin. 11: *dekstra flanko*. — La vorto *dekstra* ne taŭgas por la maristoj, ĉar ĝi ne suffice estas malsama je *maldekstra*. Ni elektis la vortojn: *ruĝa* por *maldekstra*, kaj *verda* por *dekstra*; kaj tiuj esprimoj estas internaciaj, ĉar la lumoj,

kiujn vidigas la ŝipoj, nokte, estas tiel kolorigitaj.
[Ni konsentas; sed ĉu "verda" estas komprenebla por la ordinara leganto?]

kol. 1, lin. 16: *ni estas frapitaj de vento.* — Laŭ la franca teksto, oni devas diri: *naj veloj estas kontraŭe ŝveligitaj per ekšango de vento...*

kol. 1, lin. 21: *ni transdirektis la ŝipeton laŭvente.*

— La mariſta esprimo estas pli mallonga: *ni loſis.*
A. to luff, F. loſſer, G. anluven, Sp. orzar,
It. orzare.

kol. 1, lin. 39: *ſaligis.* — Mi proponas *malhisis.*


A. to hoist, F. hisſer, G. hisſen, Sp. izar, It. issare.

pg. 49, kol. 2, lin. 35: *(nau)dekoble naudek-kanona fregdto.* — La franca teksto estus tradukata: *ſipo kiu netaksebla nombro da kanonoj.* [Ne; la angla esprimo estas, *had we been 10 times a 90-gun ship.*]

Numero de Aprilo:—

pg. 63, kol. 2, lin. 44: *alnagintajoj:* Kial la prefikso *al?* [Prave, *al* ne estas necesa.]

pg. 64, kol. 1, lin. 30: *velstango:* — Mi proponas: *jardo.*
A. yard, F. vergue, G. raa, Sp. verga, It. ree.
[Jes, sed kiel traduki la anglan mezuron *yard* = 3,6' coloj? Nek ulno, nek metro taŭgas.]



Aŭtokromio.

Nova Metodo por Rivelri la Aŭtokromajn Platojn.

Verkita de Ch. VERAX.

La firmo Lumière, el Lyon, jus publikigis novan metodon por riveli* la platojn, kiujn ili nomis "Aŭtokromaj," kaj per kiuj oni ricevas tiel admirindajn kolorfotografajojn.

Ĝis nun, ĩajn malfacilajojn renkontis la fotografanto, kiu provis tiujn platojn. La ĉefaj estis: (1^o) Operacio en tuja mallumo, rekomenrita de la fabrikistoj Lumière mem, pro la tre granda impresigemo de tiuj platoj antaŭ ĉe la ruga lumo, kaj kiu lasis la operacianton en tuja nescio pri la maniero, laŭ kiu la bildo riveligis. Necese estis riveli dum difinita tempo, kaj tio sukcesis nur kiam la impreso estis nepre taŭga. (2^o) Uzo de rivelbano kies konsisto estis nešangebla, kaj per kiu oni sukcesis nur kiam la impreso de la plato nepre respondis al ĝia konsisto.

Tial, la takso de la impresotempo farigis tre malfacila, multe pli ol en la kutima nigrofotografado, en kiu tamen tiel multaj fotografantoj eraras.

Al la supreditaj malfacilajoj, oni povas aldoni akidenton, kiu ofte okazas en varma sezono: la gelateno kaj la subtavolo forlasas sian vitran subportilon, kaj aperas largaj verdaj makuloj, kiuj difektas la bildon.

Per la nova metodo konsilita de S-roj Lumière, ĉiuj fotografantoj, kiuj kutime ricevas bonajn fotografajojn per la ordinara procedo kaj kiuj jam manipulis ortokromatajn platojn impreseblajn de la ruga lumo, ankaŭ ricevos rapide bonajn rezultatojn per la *Aŭtokromaj* platoj, kaj plzure uzos tiujn ĉi, kiuj liveras kolorajn bidojn tiel agrablajn kaj tiel belegajn.

La konsisto de la unua rivelbano estas nun farota jene:—

A.—Solvajo pirogajla.

Akvo	...	100 cm ³
Likva natria bisulfito	...	2 gutoj
Pirogajla acido	...	3 "
Kalia bromido	...	3 "

* Rivel = to develop (phot.).

B.—Solvajo amoniaka.

Akvo	...	300 cm ³
Anhidra natria sulfito	...	10 gutoj
Amoniako, 22° B.	...	15 cm ³

Por prepari la rivelbanon, versu en la kuveton ĉe la momento de l' uzo:—

Solvajo A	...	10 cm ³
Akvo	...	100 "
Solvajo B	...	10 "

Miksu per balancado.

Aparte, versu en gradigitan glaseton 45 cm³ da solvajo B, por tuta aŭ parta aldonon en la rivelbanon dum la rivelado, se necese.

La lanterno devas esti provizita per tre malhelaj ruga vitro, aŭ pli bone per folioj de speciala papero, kiun la firmo Lumière nomis "Virida." Maskinte la lumon de la lanterno per maldiafana kartonfolio, oni metas la rivelotan platon en la rivelbanon. De tiu tempo oni komputas la sekundojn pense aŭ per alia ajan maniero.

Post 20 sekundoj, oni levas la kartonon, kaj oni rapide rigardas ĉu la bildo aperas sur la plato.

Laŭ la nombro da sekundoj, pasintaj de la enmeto en la rivelbanon ĝis la apero de la unuaj linioj de la bildo, oni aldonas kelkajn kubajn centimetrojn de la solvajo B, kiel montras tiu ĉi tabelo:—

Apero post:	Oni aldonas:	La tutaj riveladoj daŭros:
22 al 24 sek.	nenion	2'
25, " 27 "	2 cm ³	2' 15"
28, " 30 "	8 "	2' 30"
31, " 35 "	15 "	2' 30"
36, " 41 "	20 "	2' 30"
42, " 48 "	25 "	2' 30"
49, " 55 "	30 "	2' 45"
56, " 64 "	35 "	3'
65, " 75 "	40 "	4'
pli ol 75 "	45 "	ne devas superi 5'

Nur ĉe la momento, kiam la ĉefaj linioj de la bildo aperas, oni aldonas la difinitan kvanton da solvajo B.

Kiam la tempo de la rivelado estos pasinta, oni povas rigardi antaŭ la ruga lumo, ĉu la bildo sufice riveligis. Tion oni scios kiam en la plej blankaj partoj (ombroj) de la bildo aperos kelkaj metaloj. Tiu ĉi povas esti tre malprecizaj. Ili ne malaperos dum la sekvantaj operacioj; kontraŭe, ili farigos pli videblaj.

La blankaj partoj ne devas grizi, ĉar pli poste la bildo estus tro maldensa.


Poste, oni lavas kaj enmetas la platon en la acidan solvajon de kalia permanganato, kaj la sekvantajn operaciojn oni daŭrigas kiel kutime.

Rigardante la platon antaŭ la ruga lumo nur post trempado en la rivelbano, kaj iom mallonge kaj malofte, oni ne vuolos la bilden. Kiam oni ne bezonas rigardi la bilden, oni devas kovri la kuveton per la kartonafolio.

Post la detruo de la negativa bildo per la permananganata bano, estas necese, se oni volas malhelpi eblan malgluiĝon de la tavolo for de la vitro, trempi la platon, post lavado, en solvajo de kroma aluno (alumina kaj kroma duobla sulfato), 5%, dum kelkaj minutoj.

Post la dua rivelado, estas ankaŭ rekomendinde lavi kelkajn minutojn kaj sekigi la platon, antaŭ ol daŭrigi la operaciojn por plidensiĝo de la bildo.

Kaj ankaŭ, se la banoj estas nesufiĉe malvarmaj, estas necese malvarmigi ilin per glacio.



Enigmo.

Demando: Kiamaniere la rano estis malprava, eksaltante malsupren la teruran krutajon?

Solvo: Ĉe la fundo, li dispecigis kaj tiamaniere faris eraron.

J. A. G.

Alilanda Opiniaro.

Bulgarujo. — *El Lumo.* Pri *La Konfeso de Beaufront-Ido*, en *L'Esperantiste*: "Cu li pensas, ke per tiu konfeso li senkulpigus sin? Ni dubas. Sian maskon li nun ne malkovras, gi estas jam de longe dissirita de honestaj defendantoj de nia afero..." Ce tiu punkto nia samideano en sia indignego sin esprimas per vortojn fortaj. Li finas jene: "Ni nur miras, kial ankoraŭ la francaj esperantistoj permesas al li utiligi la pagojn de ilia organo. Oni bezonas montri al li la pordon. [Vidu sube: Francujo.] Pluan laboron en nia esperantista domo li ne havas." — H. HARALAMBEV.

Franoujo. — Dum la lasta tempo oni balotis pri la renovigo de la Komitato de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto. Tiu ĉi balotado havis apartan intereson pro la fortaj penoj de areto da malkontentaj reformemuloj elektigi siajn ĉefojn en la Komitaton. Felice, iliaj penoj montrigis tute vanaj. El 1,200 voĉdonintoj, rajtante po tri voĉoj, 1,100 voĉdonis por S-roj Cart, Evrot, Broca, Tarbouriech; 800 por S-roj Noel, Saquet, Muffang; sed por la tri reformistoj, S-roj Michaux, Bel, Jamin, voĉdonis nur 400, kaj el tiuj 400, almenaŭ 300 samtempe voĉdonis por S-ro Cart kaj Jamin, du sinjoroj, kies opinioj pri reformoj ŝajne estas tute kontraŭaj!

El Lingvo Internacia. — Oni scias, ke la Delegacia Komitato elektis "Konstantan Komision," speciale por reformi Esperanton aŭ, pli ĝuste, por ĝin "konstante" reformadi, ĉar la Komisio ne nur Esperanton reformas, sed poste la reformojn mem kaj poste ankaŭ la reformojn de la reformoj. Ekzemple, en la lastaj monatoj, la vorto *sinjoro* sinsekve farigis *siro*, poste *sioro* kaj lastatempe *sinioro*, tiel ĵaluzigante per sencesaj ŝangigoj la kompatindajn *madamo* kaj *damzelo*, kiuj per unu fojo atingis la faman "netransireblan limon" de bonegeco, kaj devas kontentigi nur per tio, ke ili anstataŭis *sinjorino* kaj *frauino*; laŭ farigis *slon* kaj poste *segun*; "aŭtoritata kongreso" estis en Oktobro *autorizita* kaj poste *autoritatoza*; *rubigi* farigis *rubrijar*, sed poste montrigis, ke *redijar* pli proksimigas al la "netransirebla limo" de bonegeco; *vi* farigis *vo* kaj poste *vu*; la sufikso *er* unue malaperis kaj poste reaperis kun nova signifo de *nemetiisto*; *tiu* farigis *istu*, *estu*, *ostu* kaj poste *ulta*, *elta*, *olta*, sendube multe pli internaciaj; *tiu* *ci* farigis *icu*, *ecu*, *ocu* kaj poste *ilca*, *elca*, *olca*, sendube por montri, ke "la problema de lingvo internacia estas sciencia problema, kiu povas ricevi nur unu difinitan solvon, preter kiu nenio estas trovebla, kaj vante estas supozitaj pri serio da estontaj reformoj"; la eleganta pronomaro *mei*, *tui*, *voi*, *ili*, *eli*, *oli*, *nui*, *vui*, *lii*, *illii*, *ellii*, *olii*, *sui* ŝangigis en *mei*, *tui*, *vui*, *si*, *ilsi*, *elsi*, *olsi*, *nii*, *vii*, *lii*, *elii*, *olii*, *sui*, sendube pro la sama motivo de "nur unu difinita solvo" kaj por montri, kiom alte la belsoneco de Adujido superas tiun de Esperanto; *nun* farigis *nunk* kaj denove *nun*; *nu* farigis *na* kaj denove *nu*; *jes* farigis *si* kaj poste *yes*, sendube ĉar la tro fervoraj komitanoj, en sia tro granda fervoreco, transsaltis, nerimarkinte, la netransireblan limon de bonegeco kaj devis returne reveni, k.t.p., k.t.p.

Por tiu Penelopa laborado la Konstanta Komisio, starigita de la Delegacia Komitato, konsistis el S-roj Ostwald, Baudoin de Courtenay, Jespersen, Couturat, Leau kaj de Beaufront. Sed la reformado de Esperanto estas sendube tre malfacila laboro, ĉar P-ro Ostwald jam en Januaro eksigis el la prezidanteco de la Komisio "pro laceco" kaj — li diris — pro longa vojago.

S-ro Baudoin de Courtenay siaflanke deklaris, ke "la Delegacio finis sian rolon, kaj nun sole *la Esperantistoj* estas kapablaj sci, kiamaniere oni devas plibonigi la lingvon, kiu *ili uzas*. Al la Konstanta Komisio, kies

membro li estas, li rifuzis kompetentecon en la reformado de Esperanto kaj ĝin nomis "senrajta." — P. CORRET.

El L'Etoile Esperantiste. — En lingvo, nur vortaro ŝangigas. Gi pliriĉigas per vortoj novaj kiuj tradukas ideojn, elpensajojn novajn. La vortoj havas propran vivon. Ili naskigas, pereas, revivigas aŭ pli ĝuste ili dormas kaj ree vekigas iafoge, ĉar la libroj presitaj savas lin el la morto. Sed la gramatiko de ia lingvo ne multe ŝangigas kaj la morfologio ĉiam restos sama. La formoj de la pronomoj, verboj, prepozicioj, k.t.p., la reguloj generalaj de la sintakso ne ŝangigas, tiamaniere ke la lingvo de Racine, Molière, Bossuet estas hodiaŭ moderna kaj komprenda de ĉiuj. Oni ne kontrahetmetu al ni la malrapidan formigadon de la lingvo franca, la longan periodon de prilaborado el kiu eliris la formoj definitivaj. Okazis grava fakto, kiun oni devas ĉiam havi antaŭ la okuloj, de l' tempo kiam la presarto multigis la librojn, la ĵurnalojn, de l' tempo kiam la instrueco generala disvastiĝis tiamaniere ke ĉiuj homoj hodiaŭ povas legi kaj skribi, la lingvo fiksigis, preskaŭ ne ŝangebla, ĝi akiris gradon de stareco gramatika definitiva, tiel ke ĉiuj penadoj de plej kleraj scienculoj francaj, kvankam ili estas tute pravaj, ne sukcesis kaj eble neniam sukcesos korekti iomete l' ortografion. Oni ripetis al ili kaj prave: Estas tro malfrue. Nun triumfas la tradicio. La utilo tre malgranda, kiun alportus kelkaj korektoj plej konformaj al la logiko, ne suficius por pravigi la renversegon de kutimoj enradikiĝintaj. La opinio generala kontraŭstaras, ne permesas. Kaj tamen la afero estas nur pri kelkaj literoj forjetindaj! Per kia ribelo, per kia nevenkebla protesto estus akceptita la propono modifi la regulojn, la formojn mem de la gramatiko! — AJNO.

El Paris Esperanto:

En la numero Maja de sia gazeto, S-ro de Beaufront fine konfesas, kion ni jam suspektis de longe, nome, ke li estas *Ido*.

Por ni francaj Esperantistoj la jenaj demandoj estas nun gravaj:

1-e Ĉu iam S-ro de Beaufront konigis al D-ro Zamenhof, konfidenco aŭ ne, ke li opinias, ke reformoj estas necesaj en Esperanto?

2-e Kiam D-ro Zamenhof proponis al S-ro de Beaufront, ke li estu la oficiala advokato de Esperanto antaŭ la Delegacio, kaj ke li defendu nian *senĝangon* lingvon, ĉu, akceptante tiun gravan rolon, S-ro de Beaufront sciigis al D-ro Zamenhof, ke li samtempe *hucas* prezentis novan lingvon, kies aŭtoro li estas?

Por ricevi certan respondon al tiuj demandoj, mi skribis al nia Majstro. Jen lia respondo:

Varsovio, la 27-an de Junio, 1908.

Kara sinjoro!

Al via demando, ĉu mi ion sciis pri la intenco de S-ro de Beaufront, mi devas respondi al vi jenon:

En la daŭro de nia tuta longa konateco S-ro de Beaufront neniam ne sole ion skribis al mi, sed eĉ neniam faris al mi ian eĉ plej malgrandan aludon pri tio, ke li desiris vidi en Esperanto ian ŝangon. Kiam mi en plena konfido elektis lin kiel advokaton, kiu devus defendi antaŭ la Delegacio (kies veran esenco mi ankoraŭ ne konis) la ŝisnunan Esperanton kaj klarigi la kaŭzojn, pro kiuj ni ĉian reformadon trovas dangerega, li volonte tion akceptis kaj eĉ per unu vorteto ne lasis min supozii, kiajn intencojn li havas.

Via,

L. L. ZAMENHOF.

Komentario ia ŝajnas al mi vere ne necesa.

CARLO BOURLET.

Mispanujo. — *El La Suno Hispana*, No. 54:

"La defendantoj de la lingvo de *Ido* kaj de la Delegacia decidis diri, eĉ ripetis, ke la esperantistaj gazetoj, kiuj ne vaste pritraktis tiujn aferon aŭ tute

silentis pri ili, agis kiel la struto antaŭ minacanta dangero. La komparo estus malgusta, se eĉ ni estus strutoj, ĉar antaŭ ni staras nenia dangero. Cetere, ĉar hodiaŭ diversaj katoloj devigas nin paroli pri tio, klare kaj vaste ni diros nian opinion.

“*La Suno Hispana* naskigis por propagandi la zamenhofan lingvon en la hispane-parolantaj landoj. Esperanto, do, naskis nian modestan gazeton, kiu neniam celis *elekti, krei, nek kritiki* lingvon internacian, kaj neniu povas trudi al ĝi la pritraktotajn temojn. Dum ĝia vivo, publikigis kelkaj lingvoj nomantaj sin internaciaj, kiuj nek ĝojigis nek tremigis nin; ni simple silentis aŭ nur publikigis kelklinian noteton. Pli ankoraŭ; antaŭ unu jaro, apud nia redakcio, en la Grupo Valencia, okazis ridiga skismo. Ia esperantisto farigis varma defendanton de Panroman. S-ro Molenaar povis pensi pri granda aro da panromanistoj, kaj la elmontra fenestro de valencia librovendejo plenigis de panromanaj gramatikoj. Ni donis al tia afero nenian gravecon, kaj latu la araba proverbo *ni sidigis ĉe la pordo de nia budo por vidi la kadavron de nia malamiko pasantan*. Kaj tiel estis; la skismo ne sukcesis kaj sen nenio peno ni daŭrigis la esperantan propagandon. La unika ribelinto revenis en la esperantistaron.

“Tiel ni agis ĝis nun pri la novaj projektoj de Ido, Antido, Delegacio kaj ceteraj. Kial ni estas devigataj paroli pri ili, se ni nur estas fervoraj partianoj de Esperanto, de la vera Esperanto, de tiu, kiun D-ro Zamenhof klarigas en sia Fundamento?

“La Delegacia Komitato songis; ĝi songis, ke ĉiuj esperantistoj, ke ĉiuj gazetoj esperantistaj fervore akceptos ĝian lingvo-miksajon; sed kiel diris hispana dramaŭtoro *la songoj estas songoj*. Sendube estus tre agradable elpensi lingvon kaj tuj de ĝia naskigo kalkuli milojn da partianoj kaj dekojn da gazetoj; sed ĉu oni atingas la gloron tiel facile? Ne, kaj tiun respondon povas legi la Delegacia Komitato en gazetoj kaj leteroj esperantistaj. Cetere la Delegacia Komitato reprezentis centojn da diversnaciaj societoj kaj akademioj; ni esperas ke ĝia decido, pli bone *ĝia elpenso*, estos tuj akceptita de tiuj societoj kaj akademioj, kiuj nun jam devus uzi la proponitan solvon; ĝis nun tio ne okazis; nenia societo aŭ akademio decidis interriligi kun la aliaj per tia elpensaĵo, kaj ni vidas ke la Delegacia Komitato forgesas akceptigi sian decidon al siaj elektintoj kaj sin dediĉas al tute alia afero; tio estas, semi malpacon en la esperantistaro. Dio mia! kian malbonaĵon ni faris al tiuj respektindaj komitatanoj, por ke ili sin vengu tiamaniere!

“En Hispanujo ĉiuj partianoj de lingvo internacia, almenaŭ ĉiuj konantaj la ekziston de Esperanto, estas esperantistoj. For de ni estas nur skeptikuloj kaj malamikoj, kaj kion ili dirus, se ni — supoze — akceptus ĝangojn en nia lingvo? Ni perdus ilin por ĉiam, ĉar ni metus en iliajn manojn fortan kontraŭan argumenton. ‘Kiel bone ni agis ne ellernante Esperanton; nun nia laboro estus tute perdetita. Kiu certigas al ni — ili daŭrigus — ke al tiu nova lingvo ne okazos la samo, kiel al primitiva Esperanto? Hierau Delegacio de kelkaj societoj kaj akademioj sciencaj trudis diversajn ĝangojn laŭ personaj preferoj de la komitatanoj. Eble morgau Delegacio de Komercaj Ĉambroj trudos aliajn (pli-malpli logikajn laŭ plaĉo de novaj komitatanoj). Kiam ni diris ke ni lernos Esperanton kiam ĉiuj ĝin scios, vi mokis nin, sed nun vi pravigas nian diron, ĉar kiam ĉiuj scios Esperanton, tiam ni estos certaj, ke ĝi ne sangigos.’ Kion ni respondus al tio?

“S-ro de Beaufront vizitis du hispanajn urbojn, al kiuj li estis invitita antaŭ ol li sin montris publike reformemulo. En *San Sebastián* kaj *Tolosa* li estis kore akceptita de niaj tieaj fervoraj samideanoj, li parolis, li toastis, sed li konvinkigis ke la vorto *reformo* estas malpermesata en la Hispanaj Grupoj.

“*Lasta horo*: Kiam oni kompostas tiun ĉi numeron ni ricevas la majan numeron de *L'Espérantiste*. En ĝi S-ro

de Beaufront forlasas la pseŭdonimon kaj deklaras, ke Ido estas li mem. Ni bedatras el nia tuta koro, ke persono, kiu elvekis ĉe la hispanoj tiel vivajn simpatiojn, ĵus finis tiel malbone sian esperantistan vivadon.

“Nun ni esperas, ke S-ro de Beaufront, foririnte el la esperantistaro, lasos en plena paco siajn antaŭajn kunlaborantojn. En la mondo estas multaj neesperantistoj, inter kiuj li povos propagandi sian lingvon.” — R. DUVOS.

Japanujo. — *El Japana Esperantisto*, No. 4, 1908: — “Esperantisto estas la persono, kiu uzas nian Esperanton, sed ne alian. Se oni aprobas alian Esperanton, pli vere ne Esperantan, ilin ni ne nomus plu Esperantisto...

“Kian ajn rezultaton la Delegacio prezentos, ati kia ajn nova lingvo sub la nomo de reformita naskigos, Esperanto restos Esperanto, kaj Esperantisto ĉiam Esperantisto. Se Esperanto pereus — kvankam tute neeble — tiam ankaŭ perdiĝus Esperantisto, ĉar ne povas ekzisti eĉ unu Esperantisto, kiu ne uzas Esperanton...

“Ni aligis al la Deklaracio de l' gazetistoj, ĉar ni estas Esperantistoj, kiuj uzas Esperanton de D-ro Zamenhof kaj fidele obeas al la Fundamento. La kaŭzo estas tre klara kaj simpla. Ĉu la Deklaracio estas la minaco de bojkoto, ĉu ĝi havas la ŝajnon de ‘trust’ de aferistoj, kiel opinias la *Belga Sonorilo*, tio ne koncernas al la motivo de nia aligo. Se ni estus eldonistoj, kaj ricevus eĉ la plej malgrandan profiton per Esperanto (ni uzas tie ĉi la frazon de la sama ĵurnalo) tiam ni estus minacataj de ia bojkoto, kaj opinis necese, ke ni partoprenu al tiu aŭ alia ‘trust’. Sed la fakto sufiĉe montras: se ni volus ricevi ian materialan profiton per la ‘trust’ de l' gazetistoj, ni jam en la komenco estus ĉesintaj nian aferon, ĉar ni malgajnis kaj ĉiam malgajnadas sufiĉe grandan sumon da tempo kaj mono por nia propaganda afero.”

Polujo. — *En Pola Esperantisto*, en artikolo titolita “*El la Historio de Reformoj*,” S-ro A. DE GRABOWSKI skribas: — “La Esperantistoj de la unua horo, kiel ankaŭ tiuj novaj samideanoj, kiuj studis iom la dudek-jaran historion de Esperanto, scias, kiel malfacila estis la komenca propaganda laboro por nia afero... Tia sensukcesa batalado malpacientigis kelkajn el la plej fervoraj propagandistoj kaj ili komencis kulpigi Esperanton mem kaj konvinki sin, ke la mondo ne volas alpreni Esperanton, ĉar ĝi ne estas ankaŭ perfekta kaj ke oni devas ĝin antaŭ ĉio pliperfektigi. Sed kiamaniere? La genieco de la tuta konstruo estis evidenta kaj neatakebla, sed oni trovis, ke kelkaj detaloj malplaĉas al tiu aŭ alia; oni do opinis, ke oni devas ŝangi tiujn detalojn, ĉar ili malhelpas la rapidan disvastigon de la lingvo internacia. La reformistoj komencis do pripensi la plej diversajn reformajn projektojn, ĉiu laŭ sia plaĉo. Ĉiu reformisto havis propran pretan reforman projekton kaj por ĝi unu adepton, t.e. sin mem; la aliaj volis ĉiu ion alian. Mi mem, fariginte ano de reformoj, studis la komparan lingvosciencon romanen el verkoj de Diez, Körting kaj aliaj, kaj intencis transformi Esperanton en lingvon iom pli naturan, romane homogenan kaj por la instruitaj lingvistoj senpere kompreneblan. Ĉu la lingvo ricevis la deziritan kvalitojn mi ne povas jugi, sed mi ne perdis por unu momento la konscion, ke ĝi farigis multe pli malfacile ellernebla por homoj lingviste ne instruitaj. Vidante, ke ĉiuj eblaj reformoj neniu kontentigas, mi forlasis la propagandon ĝis la tempo, kiam la bonega granda verko “*Historio de Lingvo Universala*,” de Prof. Couturat kaj Leau min fine konvinkis, ke malgraŭ ĉiuj kontraŭdijoj Esperanto prezentas la solan veran solvon de lingvo internacia. Baldaŭ poste montrigis, ke Esperanto tia, kia ĝi estis, ricevinte la subtenon de la franca sciencularo, rapide venkis la antaŭjugojn, kaj gajnis centmilojn da ĉiunaciaj adeptoj,

kiuj sen iaj malhelpoj gis uzas por buſa kaj skriba interkompreñigo.

“ Esperanto farigis sekve lingvo viva, kiu povas disvolvi nur tiel, kiel la ceteraj lingvoj vivantaj, kaj samtempe ĉiu diskutado pri sistemaj ŝangoj farigis tiel same sencela kaj sensenca, kiel estas propono enkonduki sistemajn ŝangojn en lingvon anglan, francan aŭ polan.”

To the Editor of THE BRITISH ESPERANTIST.

SIR.—Emulating the example of the reformers of Esperanto, the Delegation for the Adoption of Reformed English is about to issue its official report at Tooley-street, in the town of Holancorner, New Zealand.

The Delegation desires to express its obligations to the inventors of Ido, whose ideas and suggestions have been extensively utilised.

The improvements decided upon by the Delegation are expected to be adopted throughout the English-speaking world simultaneously with the general adoption of Ido.

The following example will indicate the principal changes ordered by the Delegation:—

PRIMITIVE ENGLISH.

A fiasco awaits us. It has been decided by us to makethose necessary changes in our language which may be expected to render it acceptable to the wishes of reformers, and more conformable to the principles of simplicity.

It will be evident to all lovers of change that Idaço is as much superior to English as Ido is to Esperanto, but as all those conservatives whom we oppose are certain that our innovation is sheer idiocy, we beg them not to alarm themselves, for if our idea really is idiotic it will not succeed.

Idaço.

REFORMED ENGLISH (Idaço).

A fiasco expects we.

Ol hasez been decided by we to makar thoi necessaryoni changi in wea language which mayez bar expected to render ol acceptabla to the wishi di reformeri, ed more conformablon to the principli di simplicityor.

Ol will bar evidenta to omna loveri di changi that Idaço isezi as muche superiora to English as Ido isezi to Esperanto, but as omna thoi conservativi who we opposez are certaina that wea innovation oron is sheer idiocy, we begez they note to alarmar they selvi, for if wea idea realle isezi idiotica ol willez note succeedar.

Idaço.

J. L. FIELD, New Zealand.

Miaj “Esperantaj Semajnoj.”

Ageme preparanta mian aŭtunan programon mi ĵus memoras, ke estos eble konsilinde ekzameni la situacion laŭ vidpunkto de la pasinta jaro, antaŭ ol komenci novan jaron.

Mi faris raporton pri la unua dudeko da “Semajnoj” en la Januara kajero de nia jurnalero; de Januaro ĝis la fino de Majo mi faris alian dekkvaron; kelkse semajnojn mi perdis pro festa tempo kaj la gripo. La lokoj vizititaj estas Sunderland (dufojojn), Carlisle, Bath, Swindon, Halifax, Wrexham, Rhos, Hebden Bridge, Brighouse, Huddersfield, Todmorden, Chester, kaj Newcastle (duan fojon). La atidantaro estis entute plimalgranda ol antaue, ĉar mi ĉesigis la senpagan eniron. La utilo estas, ke tiuj, kiuj venas por aŭskulti la enkondukan paroladon, estas seriozaj interesuloj; sekve, la proporcio de la lernantoj estas nature pli granda. Mi estas feliĉa konstati, ke la entuziasmo elvokita per tia propagando estas ĉiam grandega kaj kreskanta. Cie la jurnaloj montrigas tre simpatiaj, kaj

multe priparolas la aferon. Grupoj preskaŭ mortintaj revekigis kaj novaj starigis en dek lokoj, aliaj plifortigis. Mi mem guas la laboron pro la afero, eĉ kiam la kondiĉoj estas iom malkuragaj, kiel okazis kelkafoje. Sed la plej kuragiga estis mia klopoado en la graflando York. Tion mi klarigas interalie per la fakto, ke mi tie laboradis dum pluaj semajnoj en la sama regiono kaj tiel ricevis pli da rekompenco el la elspezoj financaj kaj energiaj. Tiun sistemon mi de nun sekvas, kaj tiel evitos plej eble la longajn kaj oftajn vojaĝojn. Finance ankaŭ la lasta duonjaro estis pli kontentiga ol la unua, kvankam la “Semajnoj” ankorau ne alportis monan profiton. Sed la rezultato plibonigas kaj mi esperas, ke mi baldaŭ reakiros la malgajnojn pasintajn.

Kia domago, ke tiu propagando estas tiom multekosta! Ciu “Semajno” kostas meznombro 8 ĝis 10 funtojn, spite ĉiuj ŝparajoj, kaj kalkulinte nenion por mia laboro; por bonege organizi la aferon oni bezonas centran komitaton, kiu farus la tutan organizan korespondon kaj klopon, kaj tiu komitato bezonus monrimedojn, almenaŭ 2-3 cent funtojn ĉiujare. Tiam mi ne perdus tiom da tempo pro antaŭaj aranĝoj kaj tiom da okazoj por grandega propagando. Fidante je la kuragigaj kaj flatemaj vortoj de multaj samideanoj mi faris ĝeneralan alvokon al la brita Esperantistaro por ke ili mone subtenu mian klopon. La respondoj ne estis tre kuragigaj, kaj sen la helpo de miaj amikoj kaj novevarbitoj, kiujn mi fervore petegis, mi ne estus povinta daŭrigi la bataladon ĝis nun.

En la Januara jurnalero mi aludis la ricevon de £51 4s. De tiu tempo mi ricevis la sekvantajn sumojn:—

	£ s. d.	£ s. d.
J. Blaikie, M.A.	1 1 0	Du sinjorinoj, Bath ..
D-ro R. J. Alexander ..	2 0 0	0 10 0
C. R. S.	10 0 0	De la propaganda kaso,
Kolonelo Gale	2 0 0	per S-ro H. B. Mudie 26 0 0
F.ino Staveley	1 0 0	De la Edinburga Grupo 2 7 0
F.ino Peckover	10 0 0	De la Bradforda Grupo 0 18 0
A. Burkhardt	2 0 0	C. Bicknell
Felix Moscheles	1 0 0	5 0 0
D-ro Harrison	1 1 0	64 17 0

Al kiu oni devas aldoni £30 ricevitaj prunte, kaj ĉirkaŭ £100, kiujn mi ankorau ŝuldas. La gesamideanoj vidas do, ke mi ne ankorau riĉigis, sed multe male; mi bezonas tre sukcesan jaron por regajni la efektivajn perdojn de la unua jaro. Tial, dankante al la helpintoj, mi daŭrigos esperi al mona helpo de tiuj, kiuj aprobas mian laboron kaj opinias, ke ĝi devus esti daŭrigata. Iam mi kredis, ke la somera laboro en la Insulo de Man helpos egaligi la kontojn en miaj kalkuloj. Sed, ho ve! la skeptikuloj estas ĉiam pravaj. La libertempuloj en Douglas ne amase preferas — kiel ili devus — miajn lecionojn al la Pierrots! Tamen tiuj, kiuj ja venis, diras ke la unuaj estas preferindaj!

Tiuj grupoj aŭ individuoj, kiuj deziras, ke mi vizitu ilian regionon, bonvolu skribi antaŭ la fino de Aŭgusto. Mia adreso estas ĝis tiam: Westlake’s Sea Level Hotel, Douglas.

Jam mi korespondas pri propaganda monato en la ĉirkaŭaĵo de (1) Leeds, (2) Cardiff kaj Nelson.

A. CHRISTEN.

Ambleside.—Mr. S. R. Marshall is conducting an Esperanto class in connection with the Ambleside Summer Course held annually under the direction of Mr. Jos. Phillips.

Postaj Ĉekoj.

Ni sciigas el la *Daily News*, ke farigis interkonsento inter la Svisa Registara Poŝto kaj la Londona oficejo de la Svisa Bankujo, kun la celo, apliki al interrilatoj inter Svisujo kaj Londono la sistemon de poštaj ĉekoj jam uzatan en Svisujo. Detalajn sciigojn pri ĉi tiu arango, kiu ekfunkciis la 1an de Junio, oni povas ricevi ĉe la Svisa “Bankverein,” 47 Lothbury, E.C.

Libraro kaj Gazetaro.

Espero (Aprilo).—“Tutmonda Politiko,” de Dr. Otto Henne am Rhyn, esperantigita de V. L—o, estas tre interesa artikolo pri la sencesaj ŝangoj, kiuj konstante okazadas sur nia terglobo. Cio fluadas! “Popoloj puſas sur popolojn kun interna deziro pligrandigi, per *ilia* malprofito, *sian* influon kaj potencon.” Ni esperu, ke la disvastigo de Esperanto ŝangos ĉion ĉi, kaj, ke baldaŭ venos la tempo, kiam la mondo estos kvazaŭ unu unuigita ŝtato! La aŭtoro montras la ŝangojn en la politika vivo dum la XIXa centjaro. La artikolo estas ilustrita per kelkaj lertaj skizoj simbolantaj la nunajn ŝajnajn deziregojn de diversaj nacioj. “Vekigu, la Esperantistoj, gis ankoraŭ ne estas malfrue!” En tiu ĉi bonega artikolo la verkinto, S-ro Radiš, diras, ke la simpla lernado de Esperanto ne suficias por kunigi ĉiujn popolojn en unu fratran familion, sed, ke ni devas ankoraŭ laboradi por la klerigo de la amaso, altigi la nivelon de ilia intelekta disvolviĝo, instrui ilin pensi, kaj tiel pretigi noblan fundamenton, kiu kun danko akceptos la grandan ideon de Esperantismo. Tiaj Esperantistoj neniam defalos de nia afero. Aliaj interesaj artikoloj estas “Pri la Virina Rajtegaleco,” “Celo de la Vivo,” k.t.p.—G. C.

Japana Esperantisto (Aprilo).—En la malferma artikolo, “Nur Unu Esperanto!”, la redaktoro skribas, ke ŝajnas tre strange paroli pri Zamenhofa Esperanto, Esperanto de Ido, Delegacia Esperanto, k.t.p. Ĉiu povas krei internacian lingvon laŭ sia povo kaj ĝin uzi kaj propagandi. Neniu tio malpermesos, nek malhelpos. “Ni nur malestimas tiujn, kiuj, prenante sur sin la maskon de Esperantisto, malhelpas al ni kaj enkondukas malpacon inter ni per falsaĵo, kiun ili nomas Esperanto. Japana proverbo diras: ‘Sur la ĉielo staras nur unu suno; en la lando ne regas du regoj samtempe!’” Daŭrigo de “Urašima Taro, Juno Fiškaptisto,” malnova japana rakonto, bone tradukita de Ĉif Tošio. Ni gojas vidi, ke la anoj de la *Japana Esperantista Asocio* jam atingis gis 838.—G. C.

La Du Steloj (Majo). Oficiala organo de la *Cila Esperantista Asocio*. Nova 28-paĝa gazeto. Administracio: Casilla 728, Santiago-Chile. Jara abono Sm. 2.—Ni goje aklamas tiun ĉi novnaskitan gazeton kaj esperas, ke ĝi havos longan kaj prosperan vivon. Ĝi estas bele presita sur bona papero en la hispana kaj Esperanta lingvoj, kaj ĝia programo estas (1^o) propagando de la lingvo Esperanto en Ĉilujo; (2^o) diskonigado de nia lando inter alilandaj Esperantistoj. La redaktoro diras, ke Esperantistoj en Ĉilujo firme defendos, je kiu ajan prezo, la *Fundamento*, kaj, ke ili estos fidelaj gardantoj de la lingvo, kiun kreis D-ro Zamenhof. Estas tre kontentige audi, ke la entuziasmo por Esperanto en Ĉilujo datas precipe de la granda sukceso atingita per la Esperanta Kongreso en Cambridge. Ni esperas, ke la venonta Kongreso en Dresdeno portos similajn bonajn rezultatojn al aliaj landoj.—G. C.

Internacia Scienca Revuo (Julio).—Sekvo de “Nova Teorio Geometria pri la Movo de la Korpoj en Spaco,” kun klarigaj ilustraĵoj, de Marcel Finot; daŭrigo de “La Sabina Bieno de Q. Horacio,” de D-ro G. Sellin; “Pri la Internaciaj Ĉekoj,” kun fotografaĵo de ĉeko internacia eldonita de nia bonkonata samideano Ĉefec en Lisbono, pagebla en Londono kaj sendita Berlinon al la Imperia Patentoficejo, kiu akceptis ĝin. La ĉeko estas skribita tute en Esperanto, escepte, ke la valoro de la citataj spesmiloj estas cifere donita per angla funtoj, ŝilingoj kaj pencej. Se la ĉeko estus pagebla en alia lando la spesmila valoro devus esti montrita per la mono de tiu lando.—G. C.

La Revuo (Julio).—Ni gojas vidi, ke D-ro Zamenhof donas al ni ankoraŭ unu tradukon de sia facile plumo. Tiun ĉi fojon ĝi estas el la franca lingvo, “Georgo

Dandin; aŭ, La Konfuzita Edzo,” komedio de Molière. Ni nun havas tradukojn de nia Majstro el la dramoj de la plej eminentaj verkistoj, angla, franca, germana, rusa. En tiu ĉi numero ni trovas portretojn de Fraŭlinino Hedwig Reicher kaj S-ro Emanuel Reicher, la eminentaj aktoroj, kiuj ludos la rolojn de Ifigenio kaj Toas en la dramo “Ifigenio en Taŭrido,” ĉe la Dresdena Kongreso. Ni forte rekomendas al niaj legantoj, ke ili tralegu tiun ĉi belan dramon de Goethe, kiu estas tiel lerte tradukita de nia Majstro. S-ro C. Bourlet, la direktoro de *La Revuo*, vizitis S-ro Reicher en Berlino la 20an de Majo, kaj ni citas kelke da tre interesaj rimarkoj faritaj de S-ro Reicher en la daŭro de la interparolado. Al demando de S-ro Bourlet, ĉu oni permesas, ke li parolu esperante, S-ro Reicher respondis: “Certe, certe! Apenaŭ de unu semajno mi povis komenci la lernadon; sed Esperanto estas tiel facile, ke mi jam tute vin komprenas.” Pri siaj aktoroj, S-ro Reicher diris: “Mi postulas, ke ili *sciu* la lingvon, ke ilia elparolo estu perfekta, ke ili plene *komprenu* sian rolon, *gin sentu*, por ke la prezentado estu bonega. Mi firme esperas, ke tiu prezentado ne estos la sola; se ĝi sukcesas, mi *gin ripetas* . . . ; eble mi organizos ion en Aachen.” Rilate al aliaj artoj kompare kun la dramarto, li diris: “Ĉiuj artoj, aŭ preskaŭ ĉiuj, estas kvazaŭ internaciaj: la pentro, la skulpto, la gravuro, la muziko, eĉ la literaturo dank' al tradukoj, estas internaciaj; nur la dramarto estas severe enkatenita en la naciaj limoj. La agkampo de aktoro estas tiel malvasta, kiel la parol-kampo de lia lingvo. Kia neesperebla progreso, kia gajno por la teatro, se iam fondigos la ‘internacia teatro,’ kies publiko estos *la Mondo!* Antaŭ kiam ekzistis Esperanto, tio estis nur songo; sed nun la bela songo efektivigos, kaj mi per ĉiuj miaj fortoj penados por ĝin realigi.” Ni korege reehas tiun ĉi grandan ideon. S-ro Reicher diras, ke en tiu ĉi afero li ne ceas ian monan profiton, kaj ke li nur revas pri bela okazo por taŭge fini sian jam longan kaj plenigitan karieron. Ni sincere esperas, ke li plenumos sian grandan ideon, kaj ke la bela kronado de lia artista vivo estos la fondo kaj starigo de internacia, ĉie komprenata dramarto. En la alia enhavo troviĝas “Morto de Tiberio,” de Geibel, tradukita de Otto Liesche; “Gilliatt kaj Pulpo” (kial ne *polipo*?), el “Les Travailleurs de la Mer” de Victor Hugo, tradukita de Henri Ragot; “Al Dresden,” de Carlo Bourlet; “La Rozoj Floradis,” versajo esperantigita de Leopold Elb. En la Felietono estas tre interesa letero de Edmond Privat, kiu diras: “Usono havas jam mirindan fortan movadon esperantistan. Tra la tuta lando, en urboj kaj urbetoj, eĉ kie neniuj povus suspekti, fondigis grupetoj.”—G. C.

The Australian Esperantist Monthly, 3d. Published by the Benalla Esperanto Club, Bridge-street, Benalla, Victoria.—It is the universal experience of propagandists that very much greater progress can be made in countries where there is a central Esperanto gazette to stimulate and guide propaganda, and to keep isolated workers in touch with the general progress of the movement, than in places where no such gazette exists. We are, therefore, very glad to see that Australian *samideanoj* now possess a paper of their own in the shape of “*The Australian Esperantist*, a monthly journal devoted to the interests of Esperanto.” Although the journal at present consists of only a few pages, it contains much interesting matter and several useful passages from good Esperanto authors, intended as models of style. We are pleased to see that the publishers have procured the special accented letters. The editor invites subscriptions, contributions, and suggestions from all who desire the advancement of our movement.

Oficiala Gazeto Esperantista, organo de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la

Kongresoj. Jara abono : 5 frankoj (2 Sm.) ; unu numero : 50 centimoj (20 Sd.). Redakcio kaj Administracio : 51, rue de Clichy, Parizo.—Estas sendube neniu propagandisto, neniu paroladisto, neniu rekrutvarbema samideano, kiu ne siatempe bedaŭris, ke li ne posedas iun libreton aŭ gazeton, en kiu li havas tuj sub la okuloj la plej lastajn faktojn kaj statistikojn pri la Esperanta movado, kiujn li povas elmontri kiel nerefut-ebajn konvinkilojn al sinjoroj la skeptikuloj. Jam de longe, nia Majstro mem esprimis la deziron, "ke la Esperantistaro posedu oficialan informilon, kiu havigu al ĉiuj propagandistoj certajn sciigojn pri la progreso de nia movado." Ankaŭ, ĉar ŝajnadi ekzisti en la Esperantistaro iom da dubo kaj nescio pri tio, kion faras la Lingva Komitato, dezirinde estis, ke la Komitato disponu periodan organon, por diskonigi siajn farojn kaj decidojn, anstataŭ esti devigata sin turni al la publiko per neregule aperantaj folioj aŭ brosuroj.

Tiun mankon plenigas de nun la *Oficiala Gazeto*, provizore eldonata de la Centra Oficejo, kun aprobo de D-ro Zamenhof, de S-ro Boirac kaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, ĝis la momento, kiam la fondo de speciala organiza povos fari ĝin definitiva. La utilecon de la nova gazeto oni plej bone komprenos, legante la titolojn de ĝiaj diversaj fakoj, al kiuj aldonigas aliaj laŭ bezono. La oficiala parto enhavos sciigojn pri : Komunikoj de D-ro Zamenhof ; Lingva Komitato ; Konstanta Komitato de la Kongresoj. La neoficiala parto enhavos sciigojn aŭ statistikojn pri : Centra Oficejo ; Societoj ; Konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj ; Registaroj kaj Publikaj Institucioj ; Diversaj Progreseroj ; Gazetoj kaj Literaturo.

Oni do vidas, per tiu programo, ke la *Oficiala Gazeto* intencas prezenti al la propagandistoj tre diversajn kaj utilajn materialojn, kiuj alie estus kolekteblaj nur kun granda peno. La naciaj gazetoj, kvankam ili pri la movado en siaj respektivaj landoj donas plenajn kaj precizajn sciigojn, pri la internacia movado povas pro manko de loko aŭ pro malfacileco de kolektado raporti nur tre resume. El tio rezultas, ke kiu volas ricevi konstantan kaj plenan informadon pri nia movado, devas nuntempe aboni ĉiujn esperantistajn gazetojn kaj dediĉi multon da tempo por serĉi en ili la deziratajn sciigojn ; kaj tia ĝeneralaj abono kaj serĉado farigas, dank' al la progreso mem de Esperanto, ĉiutage pli malfacila.

"Tiun situacion la *Oficiala Gazeto* ŝesigas. Ĝi tute ne konkurencos kun la nun ekzistantaj organoj ; ĉar, okupante sin pri la tuta mondo, ĝi ne pritraktos la detalojn, kiel povas fari nur la naciaj gazetoj : ĝi enhavos nur fakojn, mallonge kaj unuforme redaktitajn, sen iaj komentarioj aŭ diskutoj, kaj liveros do al la ceteraj organoj materialon, el kio ili ĉerpos tion, kio ŝajnos al ili la plej interesa, kaj por kio ili havos lokon. Kaj al la publiko, ĝi liveros resuman, sed kiel eble plej ĝustan kaj plenan informaron pri la disvastiĝo de Esperanto."

Tiu tasko estas evidente vasta kaj malfacila, kaj la unuaj provoj por ĝin plenumi ne estos ĉiel kontentigaj. Nur per la helpo de ĉiuj oni povos, iom post iom, elplenumi tiun taskon. La Redakcio esprimis sian konfidon, "ke ĉiuj Esperantistoj komprenos la gravecon de la entrepreno, kaj kunlaboros per la sendado de ĉiuj informoj, kiuj ebligas la prezanton de fidela bildo de la vasta esperantista movado."

Ni donas en alia loko anglalingvan resumon de la statistikoj, kiujn enhavas la unua numero de la gazeto. Estas en ĝi ankaŭ multo interesa pri la Lingva Komitato, kaj ni varme rekomendas al ĉiu, kiu deziras esti plene armita por eblaj diskutoj pri tio, aŭ kiu volas posedi taŭgan propagandan batalaron, tuj aĉeti por si mem ekzempleron.

Lingvo Internacia (Julio).—"Pri la Reformoj de la Delegacio." Tiuj ĉi deklaracio de Prof. Baudouin de

Courtenay estas ĉerpita el bonega artikolo, "La Historio de Reformoj," de S-ro A. Grabowski, unu el niaj plej malnovaj, konataj kaj lertaj Esperantistoj. S-ro de Courtenay estas Profesoro de Lingvistiko ĉe la St. Peterburga Universitato, kaj eksiginta membro de la Delegacia Konstanta Komisio. Li skribas :— "En multaj punktoj 'Ido' estas malpli valora ol Esperanto kaj prezantas ne *progreson* sed *regreson*. La alfabeto de Ido pekas kontraŭ la principio de unueco kaj reguleco." (Ni ne havas spacon por liaj konvinkoj kialoj.) "La infinitiva finigo *-ar* estas malbonega kaj forjetinda, k.t.p. La imperativo kun *-ez* estas absolute ne akceptebla. Ce la pronomo kaj adjektivo la signo de la sekso estas superflua, kaj mi ne povas aprobi la sistemon de Beaufront-Couturat. Ĉe la substantivo oni devas konservi la substantivan signon '*o*,' ankaŭ en la pluralo ; sekve mi ne aprobas la anstataŭon de '*oy*' per '*-i*'." Prof. de Courtenay finigas per tiuj vortoj :— "Kiu decidigas rompi la unuecon de la Esperantistaro, entreprenas paſon tre riskan kaj malbonkonsekvencon, sekve mi, volante eviti tiel gravan respondecon, estis devigita eksigi el la Delegacia Konstanta Komisio." S-ro Corret daŭrigas sian tre interesan serion de artikoloj pri "Adjuvanto kaj la Delegacio," el kiu ni sciigas, ke la komitato de la *Societo Franca por Propagando de Esperanto* petis, ke S-ro de Beaufront eksigu de la posteno de prezidanto ; al tio S-ro de Beaufront respondis, ke li devas atendi la rezultaton de la nuna balotado inter la societanoj pri reformoj. En la plua enhavo troviĝas daŭrigo de "Klopinelo" ; "La Rikoltado de la Peco," unuakta komedieto de J. Sturgis, tradukita de Clarence Bicknell ; "Lingva Komitato" (projekto pri la interna organiza de la komitato) ; "Evolucio kaj Kontinueco," de Th. Cart. En la Literatura Aldono, daŭrigo de "Manon Lescaut." —G. C.

La Stelo de l' Oriento (Majo).—Eldonata de "Esperanto Society of India." Tiu ĉi ne estas ĝuste gazeto, ĉar ĝi estas eldonata ne laŭ regulaj periodo, sed laŭoportune, kiam okazas, ke la redakcio havas libertemon meze de siaj aliaj prizorgoj. Ĝi havas nur kvar pagojn, sed ni esperas, ke baldaŭ venos la tempo, kiam ĝi pligrandigas kaj estos publikigata, se ne ĉiutage, almenaŭ monate. Tamen ni ŝojas, ke Indio (Hindujo) havas sian ĵurnalon kaj ni deziras por ĝi plenan sukcesan kaj longecon de vivo. En artikolo, "Samnacianeco en Indio," ni sciigas, ke "unu el la plej notindaj okazintajoj en Indio dum la lastaj kelkaj jaroj, estas la spirito de nacia unueco inter la diversasaj enlanduloj, kiuj ĝis nelonge estis apartigintaj pro la diferenco de lingvo kaj moroj. Kiome tiu ĉi sento devenas de patrujamo, tiome ĝi estas laŭdinda. Sed malfeliĉe ĝi ofte ŝajnas deveni de malamo al eksterlanda influo." Ŝajnas ankaŭ, ke tiu ĉi samnacianeca sento ebligis nur per la uzado de la angla lingvo kiel interkomunikilo, kaj, ke tio estas humiliĝo al kelkaj el la plej fervoraj patriotoj, kiuj deziras liberiĝi de angla influo. Tial la verkinto de la artikolo esperas, ke ili alprenos Esperanton, kiun ili povos uzi sen perdo de memrespekt. Ni plezure sciigas, ke oni ŝus fondis novan grupon en Travancore. "Perdita kaj Retrovita," rakonteto orienta pri amo kaj ŝia supervenko, bonege esperantigita de T. C. B. (Wazirabad) ; "Jurnaloj kaj Arbaroj," de Pastro J. C. Rust (Anglujo). Kolonelo H. H. Hart, bonega kaj fervora India Esperantisto, sendas tre amuzan leteron de fratiĝo al ŝia amikino, kiu, li diras, montras, ke "la Esperanta afero iom, sed ne sufice rapide, progresadas en Indio." —G. C.

La Spritulo (Julio).—Unua numero de internacia monata gazeto por ŝerco, humoro kaj satiro. Dek du pagoj. Jara abono Sm. 1.20, ĉe la administrejo, Bereiter & Meissner, 30, Johannisstrato, Leipzig, Germanujo. La gazeto estas bone presita, kaj la ilustraĵoj estas bonegaj. Sub la rubriko "Lastaj Telegramoj," la sciigo estas certe multe pli frua, ol

tio, kion ni trovas en niaj anglaj ĉiutagaj jurnaloj ĉar ni legas, ke Carnegie, la amerika milionulo, "donacis centmil dolarojn por la disvastigo de la nova helplingvo Esperanto," kaj, ke "la angla registaro intencas ektrakti kun la registaroj de ĉiuj kulturaj ŝtatoj, por ke la internacia arta lingvo Esperanto estu samtempe kaj devige enkondukita kaj en ĉiuj lernejoj instruita!!" Ni kore deziras al nia samideana *Spritudo* longan kaj gajegan vivon.—G. C.

La Abatejo de Westminster (4 penco, afrankite; 20 Sd.).—Ĉi tiu verketo estas la unua volumo de la "Verd-Stelo" Serio, tradukita el la ĉarma skizeto de la Amerika aŭtoro Washington Irving. La traduko estas bone farita, kaj ĝi la komencantoj povos ĝin utiligi kiel legolibron pro tio, ke malsupre sur ĉiu paĝo troviĝas numeritaj tradukoj anglen de la pli malfacilaj vortoj de la teksto.

Aliaj Verkoj Ricevitaj.—*Complete Course of Esperanto*, Geo. W. Freeman, of Chautauqua School of Esperanto, Sinclairville, New York, U.S.A.; *Uplnd methodická učebnice Esperanta s oběma slovníky*, prezo, 30 Sd.; *Učebnice Esperanta pro samouky i kurzy*, prezo, 9 Sd.; *Slovníček Česko-Esperantsky*, prezo, 13 Sd., Th. Cejka kaj J. Krumpholc; *Ilustrita Afijo pri la Julia Foiro* organizita de la Urbkonsilantaro de Valencia, Hispanujo, belege kolorita kaj frapanta propagandilo por ĉi tiu ĉiujara festo, kaj por Esperanto. Gi nun ornamas la legočambron de nia ĉefoficejo; *Bibliographie de l'Esperanto et Classification Décimale Universelle*, eldonita de Centra Oficejo, prezo, fr. 0.50; *Die Esperanto-Sprache auf einem Blatte*, konsistanta el vortareto kaj plenaj sciigoj pri la gramatiko, elparolado kaj vortfarado en Esperanto. Tre utila al la kongresanoj dum ilia vojaĝado tra Germanujo; ni konsilas, ke ĉiuj kunportu plenpoſon da ĉi tiuj bonegaj folioj, la prezo estas nur M.2 (1 Sm., 25.) por cento; ne forgesu ankaŭ la "Slosilojn" kaj "Tutojn" de Ĉefec en la germana lingvo! *Cifera Muziko per Esperanto*, de E. Robert, prezo 6 Sd. La gradoj de gamo signitaj per ciferoj; *Internacismo kaj Pacifismo*, de J. Duroux, tradukis Ary-Bourg, 14 Sd.; *L'informilo*, trimonata organo de la Grupo en Calais. Redaktoro, G. Perrin, 8, Rue de Rome.

¶ ¶ ¶

Internacia Propagandejo Esperantista.

En tiu ĉi konfuzita momento, en kiu kelkaj supoze amikoj de Internacia Lingvo provas nenigi la ideojn mem de tia lingvo, ni invitas ĉiujn verajn Esperantistojn kontraŭbatali tiun malamikan movadon, duobligante siajn penojn por propagandi la sole veran kaj praktikan Esperanton, t.e. Esperanto de nia Majstro.

Por tion fari, la plej bona kaj plej malkara rimedo estas kiel eble plej multe dissendi la ĉie konatajn Ĉefecajn Slosilojn, kiuj ricevis aprobojn kaj gratulojn, ne nur de ĉiuj landaj Esperantistoj, sed ankaŭ de D-ro Zamenhof.

Inter ĉiuj ricevitaj atestoj, ni nur rememorigos la vortojn de S-ro de Beaufort:—"Al ĉiuj mi diras: *Havu ilin, konatigu ilin, dissendu ilin.*"

La Slosiloj ĝis nun aperintaj en lingvoj angla, franca, germana, itala, sveda, hispana, dana, portugala, hungara, bohema kaj rusa, enhavas la tutan Fundamenton, kaj nur la Fundamenton, kun ĝiaj 16 reguloj kaj vortaro.

Ili estas haveblaj, afranke senditaj, je la subaj kondiĉoj: 1 ekz., 5 cent.; 100 ekz., 3.50 frankoj, ĉe INTERNACIA PROPAGANDEJO ESPERANTISTA, Merton Abbey, London, S.W.

Por Internacia Propagandejo Esperantista,

P. BLAISE.

Fraŭlo, kiu logas en tre komforta "ejo" en Sud-okcidenta Londono, serĉas kunloganton. Skribu al "Ebla Kunlogonto" ĉe B.E.A.

Chronicle.

NEW GROUPS.

Two new groups affiliated to the B.E.A. in June—one in SOUTHPORT, and the other, the "Natala Verda Stelo," in DURBAN, SOUTH AFRICA. In July four groups affiliated: PONTEFRACT, TODMORDEN, and HAMPSTEAD in ENGLAND; and GOSFORD, in NEW SOUTH WALES, AUSTRALIA. *Al ĉiuj samideanen saluton!*

LONDON.

Battersea.—Some 120 Esperantists took part in the open-air propaganda meeting in Battersea-park on Sunday, July 19. The gathering was a most successful one. After an hour's vigorous Esperanto conversation—the unwonted sounds causing much wonderment among bystanders—the propagandists moved off in a body to the refreshment-room for tea. Tea over, a witty speech was made by the president of the group, Mr. Hayes. Mr. Law followed, and Mr. Cameron also spoke. The scene of action was then transferred to another part of the park, where the energetic group secretary, Mr. Lee, had made arrangements for open-air propaganda speeches to be made. When the public had assembled in sufficient numbers, the Battersea green standard was raised aloft, and several excellent speeches were made by Messrs. R. Harding, G. J. Cox, Etchell (chairman), and others. The audience showed great interest, and at the close many persons gave their names to Messrs. Lee and Cameron, in order to receive further information.

Hampstead.—Esperantists—and especially *Esperantistinoj*—gathered in strong force on July 15 to inaugurate the Hampstead Esperanto Club. Dr. O'Connor presided. Miss A. Schafer gave an address on "Esperanto and Music"; Mr. Harrison Hill, after explaining how he was attracted to Esperanto—which, as he puts it, "you can buy for a penny and learn in a week"—sang an Esperanto version of his well-known song, "My Juliet"; Miss Esther Palliser sang "La filo de la Agra"; Mr. G. L. Browne made an interesting speech on "Esperanto as Kultursprache"; and Dr. Winslow Hall gave an account of the progress of the language. At the close a large number of persons joined the new club.

London Esperanto Club.—A special general meeting of the London Esperanto Club was held on Friday, July 17, under the presidency of Mr. Felix Moscheles, when Mr. Butler, 18, Leigh-road, Highbury, N., was elected secretary, in place of Mr. H. H. Croxford. Mr. A. Sharpe, 64, Lonsdale-road, Barnes, S.W., was appointed to the new post of assistant secretary. The following motion was then proposed by Mr. G. J. Cox, and, after discussion, was carried by a large majority:—"That the members of the London Esperanto Club look upon Esperanto as a distinct language from the project called Ido, and, being convinced that no good would result from an acceptance of Ido by Esperantists, will henceforth look upon all proclaimed Ido-ists as ineligible for membership of the London Esperanto Club." Mrs. Nicholl, Messrs. H. B. Mudie and G. J. Cox were elected as delegates to the Universala Esperanto-Asocio.

Stepney Esperanto Guild.—At a recent meeting the members of this guild had the honour of a visit from Mr. S. Brodetsky, the "senior wrangler," who was formerly a member, and who, when in London, frequently attends the meetings. Mr. Brodetsky showed that, although unable at present to take an active part in the work of the guild, he has not lost his interest in Esperanto, when, in response to a congratulatory resolution passed by the members, he made a short speech in the language.

THE PROVINCES.

Bedford.—The regular meetings have been suspended during the summer, but several of the lady members have held Esperanto tea-parties, and very successful these little gatherings have been. In order to encourage talking, games have been played; "clubs," "proverbs," "when, where and how," "a story in sections," "Nous venons du marché," and others, with the result that many members have acquired a degree of fluency which the more formal meetings failed to give.

Blackpool.—The first general meeting of the Fylde Esperanto Association was held at Raikes-road on June 30. There was a good attendance. The hon. secretary, Miss Alice Schofield, gave a report of the year's work, especially propaganda work in the town, such as Mr. J. Porter's efforts to interest the local police force, Mr. G. R. Mill's classes, and Mr. Jos. Hadall's work under the auspices of the Blackpool Co-operative Society. The hon. treasurer, Mr. W. Riley, showed a satisfactory balance in the society's money affairs. On account of the resignation of the president, Mr. E. Metcalfe, M.A. (Oxon.), through continued illness, Mr. John Porter was elected president. The other officers were re-elected. S-ino Hawliczek, an Austrian lady visitor to the town, read an interesting paper on "Ghosts." During August, owing to the closing of the Raikes-road school for the holidays, the group meetings are held at the North Pier entrance on Tuesdays, 7.30—9 p.m. Esperantist visitors please note.

The second quarterly meeting of the Lancashire and Cheshire Esperantists, held here on Saturday, July 4, was a great success. Upwards of 120 delegates were present, representing Liverpool, Manchester, Rochdale, Burnley, Nelson, Preston, St. Helen's, Southport, Buxton, Lancaster, Barrow, Vickerstown, Leigh, Bury, and Blackpool. The conference was held in the fine new Secondary School in Raikes-road, which was kindly placed at the disposal of the Esperantists for the occasion by the Blackpool Corporation. The Mayor himself, Alderman James Battersby, J.P., opened the meeting, and heartily welcomed the delegates on behalf of the town. The Mayor spoke in English, but the remainder of the proceedings was carried on entirely in Esperanto. Miss M. L. Jones, who is doing such good and useful work for the cause in Liverpool, was unanimously elected vice-president of the Federation; but Mr. H. B. Eldon, who was re-elected president, has found himself obliged to resign office, much to everyone's regret. The secretary, Mr. F. J. West, of St. Helen's, in his report, said that there were now fifteen groups affiliated with the Federation, the actual membership being about 450. The delegates resolved to approach the National Union of Teachers at their next conference at Morecambe, to get their interest and help in propagating the language. In the evening, after tea at Parker's Restaurant, the company assembled again at Raikes-street for an Esperanto concert, which was carried out most successfully by members of the Blackpool Group. The next conference will be held at Preston early in October, and the Federation invites all who can to take part.

Bradford.—The activity of this group has been well maintained. The evening classes under the education authority closed at the end of May, and on June 1 between forty and fifty candidates presented themselves for the London Chamber of Commerce Junior and Senior Examinations. The City Council Education Committee have decided, in view of the success of the classes established last year, to run similar ones during the ensuing winter, and should a sufficient number of students present themselves, no doubt additional classes will be established. Let this be an

instruction to the *gefervoruloj*. Recently efforts have been directed to establishing an Esperanto *oficejo* in Bradford, and arrangements are now being made with Messrs. Tapp and Toothill, stationers, of Market-street and Charles-street, to stock all Esperanto literature and supplies, and to exhibit at each shop a notice board advertising the society and its doings to all passers-by. Saturday, June 20, was devoted to a visit to Shibden Hall, the delightful antique residence of Mr. Jno. Lister, M.A., vice-president of the Halifax Esperanto Society. Beautiful weather, charming surroundings, and the presence of a multitude of *gesamideanoj* contributed to a memory-haunting gathering.

Harrogate.—A special gathering of Northern Esperantists is to be held in Harrogate on Saturday, September 5. It is hoped that members from Newcastle, Sheffield, Hull, &c., will attend in considerable numbers. All particulars may be had from the hon. secretary, Mr. R. H. Swainson, 47, Oxford-street, Harrogate.

Hebden Bridge.—The closing meeting of the summer months was held on June 30. All the officers were unanimously re-elected for the coming session. The local educational authorities, who have always given help and encouragement to the group, have promised to provide a class in Esperanto as part of their winter's curriculum. The secretary of the group has been appointed teacher.

Keighley.—On June 27, a gathering of West Riding Esperantists took place at Keighley. In spite of the heavy rain, which prevented the projected ramble to Ghill Grange, *via* Rombalds Moor, there were present representatives of groups in Leeds, Bradford, Wakefield, Harrogate, Mirfield, Shipley, Oakworth, and Bingley. Mr. Joseph Rhodes welcomed the visitors, and several of the representatives of the various groups made Esperanto speeches. On July 21 the Esperanto Society was honoured with a visit from Dr. Kroita, vice-president of the Tokio Esperanto Society, who opportunely arrived in time to participate in a *festeno* given by Mr. and Mrs. Jabez Crabtree, at their villa in the charming suburb of Morton Banks. At the *vespermango* a welcome to the foreign guest was voiced by Messrs. Rhodes and Ellis, and in reply Dr. Kroita expressed his delight to visit the birthplace of the first British organization, and to meet, in its president, the first foreigner outside Japan to join the Japanese Society. He should carry home very pleasant memories of his cordial reception in England, and he was deeply touched by the great kindness he had met with through his association with Esperanto. Dr. Kroita gave a couple of Japanese melodies during the evening. Next day he was obliged to return to London for the Peace Congress, after which he hopes to attend the Congress of Orientalists in Denmark and the *Kvara* in Dresden.

Pontefract.—This group, which has just affiliated to the B.E.A., now meets at the Free Library, Salter-row, every Friday evening, at 7.30. A further group has been formed in this town in connection with the Adult School, Horsefair, where Mr. F. Taylor, some weeks ago, gave a lecture on Esperanto. A class for instruction meets at the school on Tuesdays, at 7.15 p.m.

SCOTLAND.

Edinburgh.—The fine weather and the holiday season have thinned the ranks of Esperantists in Edinburgh, but no doubt those who are out of town are diligently enthusing the profane. The rambles on Saturday afternoons are continued, and largely attended. A large party on Saturday, July 18, celebrated the coming of age of Esperanto by an open-air tea among the Pentland Hills. Mr. Lüders, of Philadelphia, felt the Esperanto atmosphere of Edinburgh so congenial that he prolonged his stay after the Congress from three days to three weeks. Miss Oxenford, of Brighton, has also been a

visitor. Thirty-five members have booked passages for the Dresden Congress, and some others have signified their intention of going. The visit of the famous Berlin Philharmonic Blas Orchester to the Edinburgh Exhibition gave occasion for the interchange of international salutations in Esperanto. A letter in Esperanto, signed by the president and secretary of the Edinburgh group, was handed to the conductor, Herr Von Blon, together with a translation in German, and a printed copy of the letter, together with a German Cefec key, was given to each of the forty members of the orchestra. The letter contained expressions of warm affection for the German people, and a reference to the forthcoming Congress in Dresden. The conductor replied sympathetically, and promised to make further acquaintance with Esperanto.

Glasgow.—On June 20 the society's "Ramblers" had a cruise on the canal to Craigmarloch, and on July 4 Gleniffer Braes and Paisley were visited. On the latter occasion the society was honoured by the presence of Mr. Lüders, hon. president of the Philadelphia Group, U.S.A. Besides Mr. Lüders, the group has also had the pleasure recently of welcoming Mr. Norman Maclean, president of the group of Murcia, Spain; Mr. Ince, of Leeds; Mr. Satchell, of Manchester; and Mr. Warden, president of the Edinburgh Group, who kindly presided at their London Chamber of Commerce examination. The important commercial college, "The Athenæum," has decided to include Esperanto among the subjects to be taught next session.

Montrose.—When considering the classes to be conducted at the evening continuation school next session, the committee in charge of the matter decided to recommend that horticulture and botany be dropped from the curriculum, and that instead a class in Esperanto be inaugurated, and another class in singing be started. The decision was subsequently concurred in by the School Board. The Esperanto class will be conducted by Mr. J. D. Simpson, president of the local society.

IRELAND.

Dublin.—On Saturday, July 11, the members of the Esperanto Section of the Modern Languages Society were hospitably entertained by the Rev. T. S. Lindsay and Miss Lindsay, at their charming residence in Malahide. In spite of most unfavourable weather a good number of the *gesamideanoj* turned up at the rendezvous in Amiens-street Terminus. The train to Malahide was very crowded, and the Esperantists were obliged to separate in twos and threes in different carriages. The strange language seemed to awaken great interest among the passengers generally. Mr. Lindsay, although an isolated Esperantist (there being no other representative of the *kara lingvo* in his neighbourhood), speaks and converses in Esperanto with considerable skill and facility. He conducted the group round his admirable gardens, pointing out and explaining a number of *interesajoj*. After a most enjoyable visit the group returned to Dublin in the evening.

Australia.—Mr. S. McBurney has sent us the following, in correction of a report under "Melbourne" in THE BRITISH ESPERANTIST for May (page 95):—"The Melbourne Club held an open-air fête at the Alexandra Gardens, half a mile from the centre of the city, on February 22. I had nothing to do with the direction, however, and attended merely as a private member, Mr. Booth, the president, being, of course, chief in command, seconded vigorously by Mr. Cedric White, vice-president. On the 28th, a farewell was given to Mr. White, who has left for Europe, and hopes to be present at the fourth Congress as Australian representative.

On February 24 I was adjudicating at the musical competitions in Korumburra—seventy miles from Melbourne—and made some remarks about Esperanto, concluding with an Esperanto song. When in the country I always try to do this; and if possible give an address to the children in the local schools, to which generally the public are invited, as lately at Unmurkah (134 miles from Melbourne) and (Wollongong (44 miles from Sydney). I cannot say that these lecturettes have any permanent value, but generally books are bought, and some individuals evince interest. We in Australia are so self-contained, and find so little necessity for anything but English, that it is very difficult to rouse enthusiasm about such an unpractical thing as an international language. Still, we have several enthusiasts scattered over this Southern land, and their number is continually increasing."

§ § §

Council Meeting, B.E.A.

Held at the offices of the Association on Monday, July 13, 1908, at 6.30 p.m.

Present:—Dr. Pollen, Miss Lawrence, Mrs. Nicholl, Miss O'Brien, Miss Henningsen, Messrs. H. Bolingbroke Mudie, W. Phillimore, G. Mercer Hollis, B. Chatterton (treasurer), H. W. Southcombe, General Cox, Dr. Legge, H. F. Lowe, F. M. Sexton, E. Pointer, C. E. Lock, S. Nicholl, and P. J. Kelly.

In Attendance:—Messrs. H. Clegg (secretary), E. A. Millidge, W. W. Mann, A. E. Wackrill, A. Blott.

Mr. H. Bolingbroke Mudie was elected chairman of the meeting, but on the arrival of Dr. Pollen half-an-hour later, he vacated the chair in favour of the President.

Among other matters discussed were the following:—

Finance.—The treasurer submitted the bank pass-book, and reported as to the cash balance in hand. The secretary read a comparative statement of receipts during the month of May and June, 1907, and May and June, 1908. It was resolved to open a special donation fund, and Mr. Mudie, as acting chairman, was instructed to prepare an article inviting contributions to appear in THE BRITISH ESPERANTIST.

